

# juna amiko

Novembro 2024 • n-ro 4/2024 (181)



PROGRESIGA REVUO  
POR LEGANTOJ  
INTER 10- KAJ  
100-JARAĜAJ

▲ Samarkando: arkitektura ensemblo Ŝahi-Zinda. Foto de Anatolij Ionesov. Konversaciaj temoj. Kantu kun Juna Amiko. LUDE. LUME. Teatraĵeto. Du fabloj. Legu kaj ĝuu. Interkultura Mondo. LASTE.

# Kolibrido

Aŭtoro: Ernesto padrón

Tradukisto: José de Jesús Campos Pacheco



Jes, belege!  
Ankaŭ la ĉielarko estas belega.






# Enhavo



**Enkonduke:** Karaj amikoj! (Stano Marček, SK); Karaj legantoj! (Ahmad Reza Mamduhi, IR) ..... 4

## Konversaciaj temoj:

Problemoj de noveldeziĝintoj (Judit Felszeghy, HU) ..... 5



## Anatomio:

Muskoloj: produktantoj de ĉiuj movoj. (Renée Triolle, FR) ..... 10

## Botaniko

Flormemoroj pri somero (Raita Pyhälä, FI) ..... 11



## Kantu kun Juna Amiko:

*Vivu la stel'* (Małgosia Komarnicka, PL, Agnes B. Deans, FR) ..... 12

**Legu:** Legu kaj ordigu! Solulino (Mireille Grosjean, CH) ..... 14



**LUME:** El mia kolora vivo – kolorigu la bildon (Pavel Rak, CZ) ..... 16

**LUDE:** Kiu volas panon, ne dorlotu la manon (Mónika Molnár, CH) ..... 17



**Teatraĵeto:** La trezoro (José de J. Campos Pacheco kaj Odelvis del Sol, CU) ..... 19

**Du fabloj:** La grilo kaj la formiko. La korvo kaj la vulpo (Jean de La Fontaine, FR; elfrancisgis Luiza Carol, IL) ..... 21



**Legu librojn – premioj – konkursoj:** Amo al legado estas donaco



por la tuta vivo... Klubo de bona libro. Ekkonu polan urbon, ĝiajn flagon kaj blazonon. Trezoro de templanoj (Małgosia Komarnicka, PL) ..... 22

**Virina agado:** Novrestarigita Komisiono de



UEA por virina agado. Virinaj agadoj en frua periodo de Esperanto-movado. (Małgosia Komarnicka, PL) ..... 29

## Interkultura

**Mondo:** Perlo de Oriento... (Elena Nadikova, RU kaj Anatolij Ionesov, UZ) ..... 31




La 3-a Komuna Kongreso de Japanio kaj Koreio (Alessandra Madella, IT) ..... 36

**LASTE:** Kvino-Kvizo: Majstra mamula mistero (Stefan MacGill, NZ /HU) ..... 38



**Kie aboneblas Juna Amiko?** Landaj Repezantantoj – Perantoj de *Juna Amiko* ... 39

**Fotoj** el la 3-a Komuna Kongreso de Japanio kaj Koreio ..... 40 (+ sube )



**Eldonanto de Juna Amiko:** Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). **Jura sidejo:** Centra Oficejo de UEA, Roterdamo, Nederlando. **Retejoj:** Ĉefaj informoj pri *Juna Amiko*: <http://ilei.info/revuoj/?lingvo=eo>. Historio de la revuo: [http://eo.wikipedia.org/wiki/Juna\\_Amiko](http://eo.wikipedia.org/wiki/Juna_Amiko). La numeroj de 0 ĝis 173 (1972 ĝis 2022) publike legeblas ĉe: [www.eventoj.hu/juna-amiko/](http://www.eventoj.hu/juna-amiko/). Vidu ankaŭ [lernu.net kaj edukado.net](http://lernu.net/kaj/edukado.net). **Redaktoro:** Stano Marček (Zvolenská 15/21, SK 036 01 Martin, Slovakio), [stano.marcek@gmail.com](mailto:stano.marcek@gmail.com) aŭ [redakcio@gmail.com](mailto:redakcio@gmail.com). **Lingvaj reviziantoj:** Karine Arakeljan (Armenio), Doi Ĉieko (Japanio), Rob Moerbeek (Nederlando) kaj Utho Maier (Germanio). **Rubrikestroj:** Judit Felszeghy, Stefan MacGill (ambaŭ el Hungario), Małgosia Komarnicka (Pollando), Mónika Molnár (Svislando), Elena Nadikova (Rusio), Luiza Carol (Israelo), José de Jesús Campos (Kubo), Raita Pyhälä (Finnlando). Presita en Slovakio. **Administranto:** Hamzeh Shafiee, [ilei.oficejo@gmail.com](mailto:ilei.oficejo@gmail.com). La sekva numero aperos en Februaro 2024. **Limdatoj por sendi kontribuojn:** ĝis la fino de Januaro, Aprilo, Aŭgusto kaj Oktobro. **Jarabono** € 18 en t. n. A-landoj kaj € 13 en B-landoj, laŭ la kategorioj de UEA (€ 15 kaj € 12 por mendo de 3 aŭ pli da ekz. al la sama adreso). Reta varianto: A-lande € 11, B-lande € 7.



## Karaj amikoj!

**B**aldaŭ finiĝos la jaro 2024, dum kiu, bedaŭrinde, okazis pluraj militoj kaj konfliktoj en la mondo, sed baldaŭ komenciĝos la nova. Ni, **esperantistoj**, **esperu** (ni kredu!), ke ĝi estos pli paca, sen militoj kaj malamo. En la rubriko *Konversaciaj temoj* ni lernos kiel bone vivi kun niaj gepatroj kaj bo-gepatroj. En la rubriko *Anatomio* ni legos pri niaj muskoloj kaj en *Botaniko* ni rememoros pri someraj floroj. Denove ni povos revii kaj *Kanti kun Juna Amiko* kaj en *Legu kaj ordigu* ni estos pli ordigemaj, kaj lernos, kiel ne esti sola. Ni trovos ankaŭ *Trezoron* kaj lernos pri infanrajtoj en la rubriko *Teatraĵeto!* Pri kato, kiu ŝategis manĝi, ni legos en la rubriko *LUDE* – kaj ni kolorigos bildojn kaj trovos diferencojn en la rubriko *LUME*. Ni konatiĝos pri du fabloj de Jean de La

Fontaine. En la rubriko *Legu kaj ĝuu* ni denove vizitos Urban Bibliotekon en Italio. En “Klubo de bona libro” ni konatiĝos kun la romano “Anna de Verdaj Gabloj” de Mara Rockliff, kaj ekkonos polan urbon Jelenia Góra (Cerva Monto). En *Virina agado* ni legos pri nova komisiono de UEA por virinoj kaj pri iamaj virinaj agadoj, ekz. tiu de Klara Zamenhof, la patrino de Esperanto. *Interkultura Mondo* montros al ni “Perlon de Oriento”, Uzbekion, kaj ni vizitos ankaŭ ĝian urbon Samarkando, kie okazos la 43-a sesio de Ĝenerala Konfereco de UNESKO. En *Interkultura Mondo* ni vizitos kun Alessandra Madella ankaŭ Koreion, kie okazis la 3-a Komuna Esperanto-Kongreso de Japanio kaj Koreio. Ne mankos *LASTE* kaj *Kvino Kvizo* pri majstra mamula mistero, dum kiu ni lernos korekti kaj ordigi diversajn frazojn. Agrablan legadon de *Juna Amiko* deziras al vi via redaktoro!

**Stano Marček**

## Karaj legantoj,

**M**i estas tre feliĉa prezenti ĉi tiun numeron de *Juna Amiko*, kiuj plenana de interesaj artikoloj, kiuj spegulas la spiriton de internacia amikeco, interkultura kompreno kaj la konstanta laboro por paco. Ĉi tiu numero ne nur traktas aktualajn temojn en la Esperantomovado, sed ankaŭ prezentas tre riĉan miksaĵon de kulturoj kaj ideoj, kiuj helpas vin plivastigi vian horizonton.

Unu el la gravaj temoj en ĉi tiu numero estas la rilato de virinoj al la evoluo de Esperanto. Ni lernas pri la historio de virinaj agadoj en la movado kaj pri la novaj iniciatoj en UEA por subteni virinajn voĉojn, kiuj kontribuas al nia komuna celo. Ni ankaŭ havos okazon esplori la kulturajn trezorojn de la Oriento, inkluzive de Uzbekio, kie la urbo Samarkando ludas gravan rolon en la monda kulturo. En Samarkando baldaŭ okazos la 43-a sesio


de la Ĝenerala Konferenco de Unesko, kaj ni ege deziras, ke ĉi tiu Konferenco alportu ion bonan kaj epokfaran por nia movado, ekzemple aŭ ideale novan trian Rezolucion pri Esperanto.

Ankaŭ Koreio gastigis la 3-an Komunan Kongreson de Japanio kaj Koreio, kio estas alia grava paŝo por plivastigi la tutmondan reton de Esperanto.

Kiel ĉiam ne mankas amuzaj kaj edukaj rubrikoj, kiuj invitas vin malkovri, kanti, kolorigi kaj ludi. De niaj muskoloj ĝis someraj floroj, de fabloj ĝis etaj misteroj, ĉiu paĝo de *Juna Amiko* ofertas ŝancon por lerni kaj ĝui, estante parto de la tutmonda Esperanto-komunumo.

Mi esperas, ke ĉi tiu numero estos por vi fonto de ĝojo, inspirado kaj nova scio. Dankon pro via subteno al la revuo, kaj mi invitas vin daŭrigi la vojaĝon kun ni en la vasta mondo de Esperanto.

**Ahmad Reza Mamduhi**  
Prezidanto de ILEI



# Problemoj de novedziĝintoj

help-materialo por progresemluloj. Rubrikestro: Judit Felszeghy

## I. Ĉu vivi ĉe la bogepatroj?

Karlo (K) kaj lia amiko Davido (D) babilas en bierejo en malfru-aŭtuna posttagmezo.

K – Kio pri vi, amiko, jam delonge ni ne babilis.

D – Mi ne volis tedi novedziĝinton pri miaj ĉiutagaj sensignifaj etaĵoj. Vi estis longe for de la oficejo, ĉu bone sukcesis via mielvojaĝo?

K – Tio estis vere mirinda. Ni pasigis du semajnojn en malgranda hotelo, meze de ne-tuŝita arbaro en la Norda Montaro. Mi eĉ ne povis imagi tiel trankvilan kaj belan lokon en nia lando.

D – Ĉu komforto ne mankis al vi tie?

K – Tute male! La ĉambro kun duobla lito kaj balkono estis sufiĉe granda,

kun banĉambro apude, inteligenta televidilo, brakseĝoj, skribotablo, starlampo, eĉ kafmaŝino apartenis al ĝi.

D – Kvazaŭ hejme, ĉu ne?

K – Eĉ pli... Hejme mi ne havis tiel vastan ĉambron kun propra banĉambro.

D – Cetere, kie vi loĝas nun?

K – Ĉe la gepatroj de Paŭla. Fakte, mi ekloĝis tie jam pli frue, sed oficiale nur ekde nia geedziĝo. Ili havas duetaĝan familian domon kun ĝardeno. Ni havas propran apartamenton, kun banĉambro.

D – Vi tamen ne aspektas tute kontenta. Ĉu vi eble havas problemon kun Paŭla?

K – Ho, tute ne! Ni eĉ ne havus tempon por disputo! Paŭla ankoraŭ vizitas





la universitaton, kaj ŝi devas multe lerni, sed ankaŭ mi ne havas liberan tempon. Apenaŭ mi alvenas hejmen el la laborejo, min atendas jam preta programo. Antaŭ la vespermanĝo – tion preparas la patrino de Paŭla – mi devas helpi al mia bopatro. Li ŝatas okupiĝi pri diversaj aferoj, ripari ion, aŭ munti ion, poste li ne povas fini la laboron, kaj atendas de mi helpon. Hieraŭ ekzemple li muntis novan vestaĵpendigilon, kaj petis min teni ĝin, dum li boris la muron por la pendigilo. Antaŭhieraŭ mi kolektis kaj portadis la falintajn foliojn kaj branĉetojn el la ĝardeno kaj ni kune transportis ĉion al iu difinita loko.

D – Jes, mi komprenas vin, Karlo. Sed la familia vivo ja fluas tiel, oni devas helpi unu la alian.

K – Mi konsentas, tio estas tute normala afero, se mi povas esti apud mia edzino almenaŭ vespere. Ni tamen povas nur saluti unu la alian dum la familia vespermanĝo. Poste Paŭla estas vokata de sia patrino en la

kuirejon, dum mi devas resti kun ŝia patro.

D – Mi ne komprenas, kiel vi “devas resti” kun li. Ĉu vi ne povas diri al li, ke vi prefere restadas kun via edzino?

K – La afero ne estas tiel simpla. Miaj bogepatroj multe amas min, kaj ekde nia geedziĝo oni traktas min kiel propran filon. La bopatrino kuiras miajn favoratojn, la bopatro jam atendas ĉiutage vespere mian alvenon por pasigi kune la vesperon. Li ŝatas babiladi kun mi pri sia vivo, ŝakludi, spekti filmon en la televido, eĉ viziti la najbaran solecan viron aŭ promeni al la proksima bierejo por trinki glaseton da biero.

D – Vere malfacila estas via situacio! Sed almenaŭ restas la semajnfino libera por vi.


K – Bedaŭrinde ankaŭ por la semajnfinoj mi havas programojn. Mia bopatro vivas tre aktivan vivon. Mi jam akompanis lin al kelkaj futbalmatĉoj, kiun mi tute ne ŝatas. Mi ĝojis

kiam finiĝis la futbala periodo, sed aŭtune li elfosis sian alian ŝatokupon, fiŝkaptadon, kaj denove estas mi, kiu akompanas lin, kaj al kiu li detale rakontas pri fiŝoj, pri la beleco de tiu hocio. Mia bopatrino ĝoje kuiris la kaptitajn fiŝojn.

D – Vi tamen tute ne ŝatas fiŝaĵon, ĉu?

K – Ĝuste! Eĉ ne menci, ke dimanĉe mi devas terure frue ellitiĝi, sen manĝo, sen kafo veturi al la lago, ankoraŭ en la matena malhelo kaj malvarmo kaj sidi dum longaj horoj en la boato kaj teni la fiŝvergon.





- D – Terure!
- K – Jes! Vi ja povas imagi ĉion ĉi. Mi ankoraŭ ne scias, kion ni faros kiam la lagon kovros glacio, kaj ni ne plu povos boatumi tie, sed mi timas, ke por tiu tempo li elpensos iun alian amuziĝon.
- D – Li eble instruos al vi skii! Ha ha ha!
- K – Ne priridu min, amiko! Tion mi certe ne atendos.

## II. Alia loĝloko, aliaj problemoj

### Post unu monato, en iu posttagmezo Paŭla (P), edzino de Karlo, babilas kun siaj amikinoj Dora (D) kaj Elza (E) en eleganta urbocentra kafejo.

- Kelnerino (K.): – Kion mi alportu por vi? Ĉu vi jam elektis ion?
- P – Plaĉas al mi tiu ĉokolada torto en la fridujo, kaj bonvolu aldoni ankaŭ unu kremkukon!  
Ĉu ili estas freŝaj?
- K – Jes, ĉiuj estas hodiaŭ kuiritaj. (K. *turnante sin al la amikinoj*) Kaj kion por vi?
- D – Ankaŭ por mi kremkukon, kaj grandan kafon, mi petas.
- E – Mi deziras juglandan torton, dankon.
- K – Ĉu ankaŭ kafon aŭ alian trinkaĵon?
- E – Prefere fruktoteon. Kun frago, se vi havas tian.
- P – Grandan kafon ankaŭ por mi, kaj bonvolu aldoni ĝlaseton da dolĉa batita laktokremo!
- (*Post la alveno de la kelnerino kaj disdono de kukoj kaj trinkaĵoj*)
- E – Ho, kiom da bongustaĵoj! Ĉu vi ne timas pligrasiĝon, Paŭla?
- P – Hm... almenaŭ la kafo estu dolĉa... kaj la kukoj!
- E – Ĉu ne sufiĉe dolĉa estas via miela tempo?
- P – Pli acida ol dolĉa... sed ni babiladu ne pri tio!
- D – Kio okazis, Paŭla? Vi kaj Karlo estas la ideala paro por ni!
- P – Neniu problemo estas inter Karlo kaj mi. La problemo estas, ke li ne volis vivi kun miaj gepatroj.
- E – Strange! Viaj gepatroj estas tiel afablaj homoj, kiel Karlo ne povis amikiĝi kun ili?
- P – Li ja povis! Eĉ tro. Karlo ĉiam pretis iri kun paĉjo ien, ĉu al futbalmatĉo, ĉu por fiŝkapti. Ni ne trovis tempon por resti nur duope.
- D – Aha, do tial vi diris, ke vi ne havas tempon, kiam ni invitis vian duopon!
- E – Ni konstatis, ke vi amuziĝas prefere nur kun Karlo, sen ni! Kaj nun kie li estas, ĉu kun via patro ie?
- P – Ne jam. Li diris, ke li ne volas atendi, ĝis paĉjo instruos lin ankaŭ skii. Do, ni translokiĝis en la urbocentron al liaj gepatroj.
- D – Ĉu ne plaĉas al vi vivi en la urbocentro?
- P – Vivi en la urbocentro certe plaĉas al mi. Kvankam mi ŝategas ankaŭ la eksterurban loĝadon. Ne plaĉas al mi vivi ĉe la gepatroj. Hejme ni uzis tutan apartamenton, ĉi tie ni havas lokon en la ĉambro de Karlo kun sola pordo al la vivoĉambro. Imagu! Kiam ni hejmeniras aŭ eliras, aŭ ni volas atingi la banĉambron, necesejon ni devas trairi la vivoĉambron, dum la bogepatroj sidas antaŭ la televidilo.
- E – Ĉu ne eblas malfermi tie alian pordon?
- P – Tio ne solvus la problemon. Mia bopatrino estas afabla, helpema, sed ŝi daŭre volas min instrui kaj instrukcii. Tio jam ne plu estas eltenebla! Ĉi-matene, kiam Karlo jam foriris, la bopatrino envenis en nian ĉambron, kaj diris, ke ŝi nun helpas min en la purigado. Mi miris, ĉar mi





tute ne emis ion ajn fari hodiaŭ. Ŝi rakontis al mi kiel mi senpolvigu la meblojn. Hieraŭ ŝi elprenis de mi la lavotajn vestaĵojn, por montri, kion mi lavu kune kaj kion malkune. Mi jam ne volas prepari manĝaĵojn, ĉar ŝi tuj aperas en la kuirejo, por klarigi al mi kion ŝatas Karlo, kiuj manĝaĵoj ne estas bonaj por la sano, kiujn spicojn mi uzu, kiun manĝilaron mi surtabligu. Vere frenezige, kreu al mi!

E – Mi tute komprenas vin!

P – Mi jam ne scias, kion ni faru.

### III. Ni devas solvi nian vivon!

Post unu monato en iu vespero, Paŭla (P), la edzino kaj Karlo (K), la edzo, babilas en ĉarma urboranda drinkejo.

Por via varianto, pri tio, kiel la paro deziras solvi sian vivon.

(Legu la instrukciojn ĉe la taskoj!)

### Vortklarigoj:

**Mielo:** dolĉa manĝaĵo, produktita de abeloj, saniga, ofte uzata anstataŭ sukero kaj agrable dolĉa.

**Miel-vojaĝo:** vojaĝo tuj post la geedziĝo.

**Miela tempo:** La tempo tuj post la geedziĝo.

**Bori:** fari malvastan trueton en objekton (ofte) per elektra maŝino.

**Akompanas:** kun-iras.

**Hobio:** ŝat-okupo.

**Acida:** havanta pikantan aŭ akran guston.

**Senpolvigi:** forigi tre malgrandajn erojn de malpuraĵo.

**Boato:** malgranda akvo-veturilo, kiu







entenas malmulte da homoj.

**Boatumi:** veturi per boato.

**Fridujo:** malvarmigita interna monstro-fenestro por gardi kaj montri tie dolĉaĵojn.



Mielo.



Boato.



Fridujo.



Fiŝvergo.



Ĉokolada torto.



Kremkuko.

## Taskoj:

I. Legu atente la unuopajn dialogojn kaj respondu la demandojn (vi rajtas skribi ilin en via gepatra lingvo, aŭ en Esperanto):

- Kie, kun kiuj loĝas nun Karlo?
- Kiel aspektas la loĝloko de Karlo?
- Kiel aspektas la posta loĝloko de Paŭla kaj Karlo?
- Kion faras Karlo, kiam li estas hejme?
- Kia estas lia rilatado kun sia edzino, kaj kun siaj bogepatroj?
- Ĉu plaĉas al li loĝi ĉe la bogepatroj? Kial?

g) Kie loĝas poste Paŭla kaj Karlo?

h) Kie renkontiĝas Paŭla kun siaj amikinoj, kial ĝuste tie?

i) Ĉu Paŭla estas kontenta pri la nova situacio? Kial?

II. Faru dialogon kun via studpartner(in)o, aŭ mem verku dialogon en 12 – 15 linioj, kie:

- Bopatro de Karlo petas helpon de Karlo, ĉar lia poŝtelefono ne funkcias. Karlo ne montrante, ke ne volonte helpas.
- Bopatro invitas Karlon al fiŝkaptado por la semajnfino. Li diras, ke necesas tre frue ellitiĝi kaj veturi al la lago. Karlo respondas, ke li prefere dormas pli longe, sed li konsentas iri kun la bopatro.
- La patrino de Karlo proponas al Paŭla prepari kukon, kiun Karlo tre ŝatas. Paŭla diras, ke ŝi ne kapablas baki kaj kuiri kremojn, sed la bopatrino daŭre proponas la kuko-bakadon.
- Paŭla rakontas al siaj amikinoj, kial ŝi ne estas kontenta loĝi ĉe la bogepatroj.

III. a) Kiun solvon vi proponus al Paŭla aŭ/kaj al Karlo? Konsideru, ke Paŭla ankoraŭ vizitas la universitaton en la ĉefurbo, kaj Karlo jam laboras. Ili ankoraŭ ne havas sufiĉan monon por aĉeti propran domon/apartamenton.

- Verku mem la dialogon inter Paŭla kaj Karlo! Ili trovu solvon kontentigan por ili ambaŭ!  
Sukcesojn!

Vian solvon vi povas sendi al la redakcio de *Juna Amiko*, al la sekva adreso:  
[redakcio@gmail.com](mailto:redakcio@gmail.com)

– aŭ al la aŭtorino: [jfelszeghy@gmail.com](mailto:jfelszeghy@gmail.com).  
La plej trafa(j)n dialogo(j)n la redakcio aperigos en la sekva numero de *Juna Amiko*.

Atentu: via solvo nepre atingu la redakcion aŭ la aŭtorinon ĝis la fino de Januaro 2025.





# Muskoloj: produktantoj de ĉiuj movoj

En tiu ĉi olimpika jaro ne mankas fotoj de sportistoj, kies muskoloj estas tre videblaj.

**L**a praktiko de diversaj sportoj grandigas iujn muskolojn: naĝisto, halteristo aŭ rapida kuristo ne trejnigis la samajn muskolojn, ĉar la streboj ne estas la samaj; konklude ili ne similas unu la aliajn. Temas pri la videblaj muskoloj de la brakoj aŭ dorso por naĝi, de la gamboj por kuri ktp, la plej multaj muskoloj funkcias “kaŝe”, sed nepre por ke ni spiru, digestu, urinu...

**Skeletaj muskoloj:** ili estas 570 kaj konsistigas 42% de la vira pezo, kaj 36% de la virina pezo. Ili estas la motoro de niaj gestoj kaj movoj. Vi certe memoras, ke kiam kosmonaŭto revenas surteren, li estas perdinta 20% ĝis 30% de sia muskola pezo, pro manko de gravito. Kiel ĉiuj muskoloj (el la latina lingvo eta muso! :) – ili konsistas el fibroj, kaj estas sangoprovizitaj de vasokuloj (arterioj kaj vejnoj) kaj regataj de nervoj. Ilin ordonas la cerbo: se mi levigas por ekpaŝi, la tuta mekanismo

ekfunkcias. En via mano estas pli ol 40 muskoloj por ebligi ĉiujn gestojn kaj respondi viajn bezonojn (skribi, marteli, porti kuleron al la buŝo ktp.), en la piedo 26. Se pro handicap homo perdas la uzon de unu brako aŭ unu kruro, laborigi la kontraŭan kreskigas la forton de la handicapita membro je 10%. Evidente, necesas nutri la muskolojn per lipidaj (grasoj) kaj glukidaj (sukero).




**Glataj muskoloj** mem funkcias, sen interveno de via penso. Vi ne ordonas al via koro “batu!”, ĝi batas laŭbezone je diversaj rapidecoj. Same vi ne ordonas al via stomako aŭ intestoj “digestu!”. Ĉiuj tiaj muskoloj mem funkcias, same la plej eta korpa muskolo (2,2 mm) en la orelo permesas aŭdi. Diafragma (la “barilo” inter la brustokesto kun la pulmoj kaj la abdomena kavo kun intestoj) kontraktiĝas 24.000-foje tage, por ke aero eniru viajn pulmojn. Via koro batas pli ol 2,5 miliardojn da fojoj dum via vivo!

**Iom pri la vizaĝo:** Ĉu vi deziras rideti aŭ paroli? Vi aktivigas 17 muskolojn. Por movi la okulojn 14; se vi estas malkontenta kaj volas kuntiri la brovojn, jen laboro por 43 muskoloj. Mirinde, ĉu ne ?

**Poetoj parolas al sia koro.** Por fini, jen la originala verko de Zamenhof el la jaro 1887, en la Unua Libro de Esperanto.

Renée Triolle





**HO, MIA KOR'**

Ho, mia kor', ne batu maltrankvile,  
 El mia brusto nun ne saltu for!  
 Jam teni min ne povas mi facile,  
 Ho, mia kor'!

Ho, mia kor'! Post longa laborado  
 Ĉu mi ne venkos en decida hor'?

Sufiĉe! trankviliĝu de l' batado,  
 Ho, mia kor'!

*Zamenhof*

**Ho, mia kor'**

L.L.Zamenhof Jozsef Dinyés

Hm A Hm

1 Ho, mi - a kor', ho, mi - a kor',  
 2 Ho, mi - a kor', ho, mi - a kor'

G D A

ne ba - tu mal - trank - vi - le,  
 Post len - ga la - bo - ra - do.

G D G D

El mi - a brus - to nun ne sal - tu  
 Ĉu mi ne ven - kos en de - ci - da

D D G D

for!  
 hor'!

A7 A7 A7 A7

min ne po - vas mi fa - ci - le,  
 Trank - vi - li - ĝu de l'ba - ta - do,

Hm A Hm

1-2 Ho, mi - a kor'! Ho, mi - a kor',

Hm A Hm

ho, mi - a kor'! ho, mi - a kor'!

# Flormemoroj pri somero

Kiam la naturo ankoraŭ kaŝas multajn el siaj koloroj sub la tero, oni ĝojigu sin per someraj memoroj.

Ĉu vi rekonas ĉi tiujn florojn? En la Nordio ili estas kutimaj sed ne en aliaj landoj kaj klimatoj. Se vi estas nordano, eble vi memoras la nomojn de la floroj almenaŭ en via gepatra lingvo. Se vi havas alilingvajn geamikojn, demandu ilin, ĉu ili konas la plantojn kaj kiel ili nomas



Hepatikoj

tion en siaj lingvoj. Nur la Esperantaj nomoj estas internaciaj.

Homo, kiu ŝatas vagi en arbaroj kaj kampoj, povas havi ian florkalendaron en sia kapo. Li atendas certajn florojn en Majo, aliajn en Junio, Julio, Aŭgusto, eble ankoraŭ en Septembro. Pri la kreskejo de iu malofta floro li povas havi mensan mapon enkapo, kaj ĉiujare li serĉas kaj kontrolas, ĉu la planto daŭre aperas en la sama loko, kiun eble nur li konas sed ne malkaŝas, por ke homoj ne iru tien kaj ne tretu sur ĝin aŭ elfosu ĝin por sia ĝardeno. Ni lasu la rarajn florojn resti en siaj lokoj kaj ĝoju pri ili kiel pri memoroj.

Raita Pyhälä

◀ Pirolo estas tiu floro kaj Pirulo ▼ (sube) estas birdo kun ruĝa brusto. Finnaj nomas hepaticon (supre) *sinivuokko*, blua anemono.



Pirolo.



Pirulo.



# La sorĉa kanto-mondo

La rubrikon preparas Małgosia Komarnicka  
[malgosia.junaamiko@gmail.com](mailto:malgosia.junaamiko@gmail.com)



**Kanto akompanas nin ĉie... Ni volonte aŭskultas ĝin, ĉar ĝi helpas vidi kaj krei alimaniere la mondon, ebligas revii, aŭ transdoni niajn sentojn.**

**Ĝ**i ankaŭ helpas akiri pli bonajn rezultojn dum lernado, ĉar lernantoj, kantante, samtempe lernas, kreskigas sian emocian engaĝiĝon en la lerno-procezo. Sufiĉas nur ekkanti – kaj ili tuj memoras la kanto-vortojn. Tiamaniere la lernantoj plej bone kaj sugeste alproprigas al si la materialon de la leciono, ofte ne konsciante, ke ili ekzercas sin pri fremda lingvo. La laboro kun kanto sentigas ĝojon kaj kontenton al la lernantoj, kaj do ni ne malhelpu ĉi tiun agrablecon de kantado dum la Esperanto-lecionoj.

Baldaŭ ni festos Novjaron kaj estus bele se ni kantus la kanton dum tiu escepta nokto, kompreneble Esperante, tostante eĉ per akvo.

La tekston de la kanto skribis Agnes B. Deans kaj la muziko estas tradicia franca “Vive l’amour”. La kanto troviĝas en la “Kantokolekto por esperantistaj kunvenoj”, kiun eldonis Eldona Societo Esperanto Stockholm (FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO) en 1956.

Nun sufiĉas nur viziti la KantarVikion: [https://kantaro.ikso.net/vivu\\_la\\_stel](https://kantaro.ikso.net/vivu_la_stel)

Bonvolu sendi al mi proponojn de viaj naciaj kantoj, por ke la legantoj de Juna Amiko havu la eblon ekkoni belajn kantojn el la tuta mondo: [malgosia.junaamiko@gmail.com](mailto:malgosia.junaamiko@gmail.com)

## Vivu la stel'

1. Plenigu la glason, ho ĉiu bonul',  
Vivu la verda stel'  
Kaj kantu la homoj en ĉiu angul'  
Vivu la verda stel'!

Refreno, 2-foje:

Ho, vivu la, vivu la, vivu la stel',  
vivu la, vivu la, vivu la stel',  
vivu la stel', vivu la stel',  
vivu la verda stel'!

2. Plenigu la glason kaj tostu kun ni!  
Vivu la verda stel'!  
La lingvo kreita por ĉiu naci',  
vivu la verda stel'!


Refreno, 2-foje:

Ho, vivu la, vivu la, vivu la stel',  
vivu la, vivu la, vivu la stel',  
vivu la stel', vivu la stel',  
vivu la verda stel'!

3. Per voĉoj de nia kunbatalantar'  
Vivu la verda stel'!  
Resonu la voko sur tero kaj mar',  
Vivu la verda stel'!

Refreno, 2-foje:

Ho, vivu la, vivu la, vivu la stel',  
vivu la, vivu la, vivu la stel',  
vivu la stel', vivu la stel',  
vivu la verda stel'!



## Vivu la stel'

Teksto Agnes B. Deans

Muziko tradicia "Vive l'amour", franca

Soprano

$\text{♩} = 60$

G 3 3 D 3 C 3 G

1. Ple - ni - gu la gla - son ho - çiu bo - nul' vi - vu la ver - da stel'. Kaj

S.

G 3 3 D 3 C 3 G

kan - tu la ho - moj el - çiu an - gul' vi - vu la ver - da stel'. Ho

S.

G C D 3 3 G

vi - vu la vi - vu la vi - vu la stel' vi - vu la vi - vu la vi - vu la stel'

S.

G 3 3 D 3 G G

vi - vu la stel' vi - vu la stel' vi - vu la ver - da stel' 2. stel'.

1. 2.

1. Plenigu la glason, ho çiu bonul' , Vivu la verda stel' !  
Kaj kantu la homoj en çiu angul' Vivu la verda stel' !



*Refreno, 2-foje:*


Ho, vivu la, vivu la, vivu la stel' , vivu la, vivu la, vivu la stel' ,  
vivu la stel' , vivu la stel' , vivu la verda stel' !

2. Plenigu la glason kaj tostu kun ni! Vivu la verda stel' !  
La lingvo kreita por çiu naci' , Vivu la verda stel' !

*Refreno, 2-foje*

3. Per voçoj de nia kunbatalantar' Vivu la verda stel' !  
Resonu la voko sur tero kaj mar' , Vivu la verda stel' !

*Refreno, 2-foje:*



Mireille Grosjean

# Legu kaj ordigu!



## Solulino

1. Tio estas iom frustra.
2. «Saluton Sinjorino Solulino ! Kiel vi fartas? Ĉu ĉio en ordo ĉe vi?»
3. Mi venos je la tria horo.»
4. Tamen ŝi havas multajn kontaktojn kun homoj el la tuta mondo per diversaj retaj kontaktoj.
5. «Bone, dankon, mi atendas vin post mia siesto. Mi antaŭĝojas.»
6. Pro tio ŝi pensas: mi devas kontakti ŝin; ĉu mi telefonu al ŝi? Ĉu mi sendu poŝtkarton al ŝi? Ĉu mi vizitu ŝin?
7. Movadanino vivas sola, ŝi estas vidvino.
8. «Jes, vi pravas. Ĉiu homo bezonas kontaktojn. Mi feliĉas, se mia vizito povas ĝojigi vin.
9. Mi fartas mezbone, sed vivas sen doloroj, do mi estas kontenta. Feliĉe, ke mi havas hundon.
10. «Oh jes, bonvolu veni.
11. Plie ŝi aperas en Pasporta Servo, do pro tio ŝi foje akceptas esperantistojn, kiuj vizitas ŝian urbon.
12. Mi bakos biskvitojn por ni du kaj ni povos paroli kune.
13. Pro tio ŝi ne sentas solecon. Iun tagon ŝi pensas pri sia najbarino Sinjorino Solulino, kiu vivas sola kaj ne havas tian viglan vivon.
14. Tio estas vere bezonata ago en vivo de soleca persono.»
15. «Mi povus viziti vin hodiaŭ posttagmeze. Ĉu tio konvenas al vi?»
16. Finfine Movadanino decidas telefoni al sia najbarino.
17. Mi povas alparoli mian hundon, tamen ĝi ne respondas per frazoj...»





18. «Dankegon, ke vi vokas min! Tio tre ĝojigas min.

19. Pro tiu besto mi devas promeni kaj tiel renkontas homojn surstrate; foje ni iom babilas, pri la vetero, pri la sezono... sed ne pli.

## Solvo

Movadanino vivas sola, ŝi estas vidvino. Tamen ŝi havas multajn kontaktojn kun homoj el la tuta mondo per diversaj retaj kontaktoj. Plie ŝi aperas en Pasporta Servo, do pro tio ŝi foje akceptas esperantistojn, kiuj vizitas ŝian urbon. Pro tio ŝi ne sentas solecon. Iun tagon ŝi pensas pri sia najbarino Sinjorino Solulino, kiu vivas sola kaj ne havas tian viglan vivon. Pro tio ŝi pensas: mi devas kontakti ŝin; ĉu mi telefonu al ŝi? Ĉu mi sendu poŝtkarton al ŝi? Ĉu mi vizitu ŝin? Finfine Movadanino decidis telefoni al sia najbarino. «Saluton Sinjorino Solulino!

Kiel vi fartas? Ĉu ĉio en ordo ĉe vi?»


«Dankegon, ke vi vokas min! Tio tre ĝojigas min. Mi fartas mezbone, sed vivas sen doloroj, do mi estas kontenta. Feliĉe, ke mi havas hundon. Pro tiu besto mi devas promeni kaj tiel renkontas homojn surstrate; foje ni iom babilas, pri la vetero, pri la sezono... sed ne pli. Tio estas iom frustra. Mi povas alparoli mian hundon, tamen ĝi ne respondas per frazoj...» «Mi povus viziti vin hodiaŭ posttagmeze. Ĉu tio konvenas al vi?» «Oh jes, bonvolu veni. Mi bakos biskvitojn por ni du kaj ni povos paroli kune. Tio estas vere bezonata ago en vivo de soleca persono.» «Jes, vi pravas. Ĉiu homo bezonas kontaktojn. Mi feliĉas, se mia vizito povas ĝojigi vin. Mi venos je la tria horo.» «Bone, dankon, mi atendos vin post mia siesto. Mi antaŭĝojas.»

**La suba foto pri Doi Ĉieko kaj Mireille Grosjean aperis en konkurso pri fotoj de amikeco – kaj gajnis premion.**




# El mia kolora vivo

Verkinto kaj desegninto: Pavel Rak




Kolorigu la suban bildon laŭ la supra! Kion vi vidas sur la bildoj?  
Kiom da diferencoj en la du bildoj vi trovis?





# Kiu volas panon, ne dorlotu la manon



La rubrikon prizorgas: **Mónika Molnár**

**P**asis la unuaj monatoj de la lernojaro kaj ia rutino instaliĝis ĉe la Uletoj. Post la lernejo ili faris siajn hejmtaskojn, poste ili ludis, manĝis kaj iris en la liton. La esceptoj estis raraj kaj ŝajne tio konvenis al ĉiuj. La ludado tamen estis tre varia, kaj ĉiam en bona etoso. Almenaŭ ĝis hodiaŭ...

– Ĝi ne estas via pilko!  
– kriis Ludemulido. –  
Redonu ĝin tuj al Ginko!  
Se ne, mi tuj...  
– Kio okazos, se ne? –  
defiis lin Kveremulido. –

Mi trovis ĝin, do la pilko estas mia! Nenio alia gravas, eĉ se tio ne plaĉas al vi! Ĉu vi volas veti?

– Sed... sed vi trovis ĝin apud la domo de Ginko! Ĝi estas ŝia pilko! Ŝi ricevis ĝin antaŭ nelonge por sia naskiĝtago. Ĉu vi ne memoras?


– Se ĝi estis ŝia, ŝi devintus pli bone gardi ĝin! Nun ĝi jam estas mia pilko!  
– Ĉu vi ne hontas ŝteli ŝian pilkon?

Kion diros Avinjo kiam ŝi ekscios tion? Kaj kion diros Ginko? Kial vi ne prenas vian pilkon por ludi? Mi tute ne komprenas vin! – diris Ludemulido.

– Kial, kial? – respondis malagrable Kveremulido. – Ĉar mi ne plu havas pilkon! La mia ekhavis truon kaj ĝi ne plu uzeblas. Jen kial!

– Do, aĉetu novan kaj tiun ĉi redonu al Ginko! Estu bona kaj honesta knabo!  
– Mi estas bona, sed mi ne havas sufiĉe da poŝmono por aĉeti novan pilkon. Kaj ĉiuokaze, ŝi forlasis tiun pilkon, do ĝi estas nun jam la mia!

– Hm... mi pensas, ke vi devus legi la rakonton de Arsène Jalais [’arsen jale’] pri la kato, kiu tre deziris havi ion, kio ne apartenis al li. Mi ne scias kial, sed tiu ĉi pilko-afero vere pensigas min al tiu ĉi rakonto. Mi esperas, ke ĝi helpos vin poste.









**Arsène Jalais:**

**La kato, kiu ŝategis manĝi**

Jen la rakonto de kato nomata Miaŭ, kiu loĝis en malgranda vilaĝo. Miaŭ ŝategis manĝi. Iun tagon, dum li vagadis tra la vilaĝo, li eksentis la odoron de ĉokoladaj panetoj el la panejo.



	
<p>Miaŭ decidis, ke li volas manĝi tiujn panetojn. Li alproksimiĝis al la panejo kaj vidis, ke la pordoj estis malfermitaj. Li eniris kaj vidis panojn sur la tablo, brilajn kaj allogajn.</p>	<p>Sed Miaŭ sciis, ke li ne rajtas preni eĉ unu el ili. Tiam li ekhavis planon. Li saltis sur la tablon sen fari bruon. Li prenis du ĉokoladajn panetojn inter la dentojn kaj elkuris.</p>
	
<p>Ekstere Miaŭ ĝojis pri sia sukceso. Li trovis sekretan lokon sub arbo, kie li povis tuj profiti de siaj ŝtelitaj panoj. Kiam li manĝis la ĉokoladan paneton... Njam, li neniam sentis sin tiom feliĉa. Do, li re- kaj reiris al la panejo...</p>	<p>Sed post kelkaj tagoj, la panisto konstatis ke liaj panetoj malaperadas. Li ne estis kontenta. Li decidis meti kaptilon por la ŝtelisto. Miaŭ, nekonscia pri tio, revenis denove al la panejo por pli da panoj.</p>
	
<p>Kiam li eniris, la panisto tuj kaptis lin! Sed anstataŭ koleriĝi, la panisto ridetis. "Vi aspektas tre inteligenta kato." – li diris. "Kial ne labori kun mi anstataŭ ŝteli?"</p>	<p>Miaŭ pripensis la aferon kaj konsentis. Dum li helpis al la panisto en la panejo, li ricevis sufiĉe da ĉokoladaj panetoj rekompence. Ili fariĝis bonaj amikoj kaj Miaŭ neniam plu ŝtelis ion ajn.</p>

– La kato havis ŝancon! – diris Kveremulido. – Sed kiel tio helpas min?  
– Tio verŝajne neniel – respondis Avinjo, kiu sekvis la konversacion el la fenestro.  
– Sed se vi venas helpi min baki kuketojn por la morgaŭa merkato, tiam vi povus

honeste gajni poŝmonon por nova pilko. Kion vi pensas pri tio?  
– Mi pensas, ke mi havas eĉ pli da ŝanco ol la kato, ĉar mi havas la plej bonan Avinjon en la tuta mondo! Dankon, Avinjo! Kie estas la ingrediencoj? ☺



# La trezoro

**Verkis :** José de Jesús  
Campos Pacheco

## Ĉe la marbordo

**Naĉjo:** Ni jam havas sufiĉe da konkvoj.  
Indas foriri, ĉar vesperiĝas.

**Elenjo:** Vi pravas, sed morgaŭ ni revenu  
por purigi tiun lokon. Estas tro da rubaĵo  
ĉi tie, kaj la ĉirkaŭaĵo malbelas.

**Naĉjo:** Tutcerte! Ni revenos morgaŭ, por  
purigi kaj la marbordon kaj ĝian  
ĉirkaŭaĵon.

**Reĉjo:** Oni nepre devas forĵeti skatolojn  
da suko rubujen. Tiel oni protektu la  
vivmedion.

**Elenjo:** Ĝis morgaŭ!

## Sekva mateno


**Reĉjo:** Ni jam purigis ĉi tie.

**Naĉjo:** Kaj ĉirkaŭe! Ĉio belas nun!

**Elenjo:** Venu ĉi tien tuj! Rigardu tiun  
strangan botelon, kiun mi trovis. Ĝi ŝajnas  
antikva...

**Reĉjo:** Io troviĝas interne. Ni malfermu  
ĝin!

**Naĉjo:** (*provas malfermi la botelon*)  
Tute vane. Mi ne sukcesas. Eble mia avo  
sukcesos malfermi ĝin per iloj, kiujn li  
konservas en granda skatolo. Liaj iloj



ŝajnas tiom antikvaj kiel tiu botelo!

**Elenjo:** Do via avo kolektas antikvaĵojn,  
ĉu ne?

## Horajn poste, ĉe la avo de Neĉjo

**Avo:** Jen ĝi! Mi sukcesis. Kio estas tio?

**Elenjo:** Tio ŝajnas esti mapo.

**Naĉjo kaj Reĉjo:** Ĉu mapo?

**Avo:** Ĝi ŝajnas esti trezormapo. Ĉi tie estas  
skribite, ke la trezoro troviĝas antaŭ  
enirejo de kaverno.

**Naĉjo:** Avo, kion vi pensas pri tio?

**Elenjo:** Ni iru tien. Tiu kaverno troviĝas  
proksime.

**Avo:** Ni iru, sed ni enmetu en niajn  
dorsosakojn taŭgajn ilojn, mangaĵojn kaj  
trinkaĵojn.

**Naĉjo kaj Reĉjo:** Ek do !

## Irante ĝis la kaverno

**Elenjo:** Rigardu tiun birdeton surtere...

**Naĉjo:** Ĝi estas vundita. Ni devas meti ĝin  
en la neston. La trezoro povas atendi, sed  
la birdo ne.

**Avo:** Unue ni kuracu ĝianflugilon.

## Horajn poste, ĉe la kaverno

**Avo:** Laŭ tiu mapo, la trezoro troviĝas ĉi  
tie. (Desegnigis Odelvis del Sol Reyes.)





## Teatraĵeto

**Naĉjo:** Ni komencu elterigi ĝin.

**Elenjo:** Ek do!

### Minutojn poste

**Avo:** Jen ĝi!

**Reĉjo:** Jen stranga kaj antikva pend-seruro. Kiel ni malfermu ĝin?

**Naĉjo:** La trezoro eble apartenis al iu pirato... Eble en ĝi troviĝas juveloj...

**Avo:** Ni kunportu la skatolon hejmen. Mi ja sukcesos malfermi ĝin.

### Vespere ĉe la avo de Naĉjo

**Avo:** Mi jam sukcesis malfermi ĝin. Ni rigardu la enhavon.

**Naĉjo:** Jen nur fotoj kaj malnovaj ĵurnaloj...

Neniun valorajon ni trovis...

**Avo:** Ho! Tiuj fotoj kaj ĵurnaloj temas pri grava Esperanta infan-renkontiĝo kaj junularaj aranĝoj, kiuj okazis en nia vilaĝo multajn jarojn antaŭe.

**Reĉjo:** Ĉu tio estas trezoro?

**Avo:** Kompreneble! Tio ja estas trezoro. Ni kunportos tiujn fotojn kaj ĵurnalojn al la muzeo. Lerni pri la historio de la Esperanta Movado estas tre grave kaj interese.

**Naĉjo:** Do, nia malkovro ja estas valora!

**Reĉjo:** Ni povas prifieri pri nia malkovro!


**Elenjo:** Ni kunportu la fotojn kaj la ĵurnalojn al la muzeo, kune kun la botelo kaj la skatolo!

**Avo:** Brave, infanoj!



◆ Kolorigu la bildojn, desegnitajn de Pavel Rak!

## INFANRAJTOJ



**Aŭtoro:** Miguel Ángel Díaz  
**Tradukisto:** Jose de Jesús Campos


Saluton Mikaelo, kion vi desegnas kun tiu malgaja vizaĝo?

La estontecan mondon.

Mi vidas nek personojn nek arbojn.

eĉ ne la maron.

Kompreneble, kun tiom da militoj kaj sen protekti la medion, la mondo aspektos tiel.



# Du fabloj\*

Jean de La Fontaine, Lafonteno (17-a jarcento) estis franca verkisto, kiu famiĝis danke al siaj fabloj, plejparte inspiritaj de la antikva greklingva fablisto Ezopo (la 7-a kaj la 6-a jarcentoj A. K.).

## La grilo kaj la formiko

Kantis Gril' tutan someron  
 ĝis ŝanĝiĝis la vetero.  
 Tiam en ĝia kamero  
 ĝi ne havis eĉ paneron,  
 mankis al ĝi eĉ peceto  
 de vermo aŭ de muŝeto.  
 Do, ĝi iris al Formiko,  
 sia najbar' kaj amiko,  
 por pruntepreni nutraĵon:  
 kelkajn grajnojn aŭ muŝaĵon.  
 Grilo diris al Formiko:  
 "Ĝis aŭgust' mi pagos prezon,  
 kaj aldonos interezon."  
 Formik' estis malhelpema,  
 certe ne prunedonema.  
 Do, la Grilon ĝi demandis:  
 "Dum somer', kion vi faris?"  
 Grilo diris: "Mi kantadis".  
 Kaj respondis la Formiko:  
 "Nu, vi dancu nun, amiko."

## La korvo kaj la vulpo

Mastro Korv' sur branĉo staris  
 kaj en bek' fromaĝon tenis.  
 Mastro Vulp' fromaĝon flaris  
 kaj pro la odor' alvenis.  
 Diris li: "Saluton kara,  
 estimata birdo rara!  
 Se la voĉo via ŝajnus  
 bela kiel la plumaro,



Jean de La Fontaine.

*certe mi vin jam proklamus  
 la Fenikso\*\* de l' arbaro!"*

Tiam Korvo ekĝojegis  
 kaj ekkanti deziregis;  
 sian bekon li malfermis  
 kaj fromaĝon li jam perdis.  
 Vulpo la fromaĝon manĝis  
 kaj la paroladon ŝanĝis:  
 "Lernu nun ke la flatuloj  
 profitas de la vantuloj.

*Akiri tian saĝecon  
 ja valoras fromaĝpecon."*  
 Korvo jam komprenis tiam.

Hontigita, konfuzita,  
 Korvo juris, ke neniam  
 plu lasos sin trompita.

Elfrancigis: **Luiza Carol**

\*\*\*\*\*

\* **Fablo**: Rakonto, en kiu agas kaj parolas bestoj aŭ/kaj objektoj.

\*\* **Fenikso** – Mitologia birdo, kiu ĉiucentjare mortas en flamoj kaj renaskiĝas el sia propra cindro. Figurasence: Supera persono, unika en sia speco.



# Legu kaj ĝuu

Rubrikestro:

Małgosia Komarnicka

Pollando

*malgosia.junaamiko@gmail.com*



## Amo al legado estas donaco por la tuta vivo...

**Finante la jaron 2024 mi invitas  
vin denove al Italio, sed ĉi-foje ni  
revenos al la urbo Massa.**

**E**n tiu bela toskana urbo troviĝas la Urba Biblioteko Biblioteca Civica “Stefano Giampaoli”. Mi vizitis ĝin dank’ al la helpo de Enrico Gaetano Borrello, itala esperantisto, kiu volontule zorgas pri esperantaĵoj en Nacia Biblioteko de Esperanto en Massa.



En la urba biblioteko  
*Biblioteca Civica Stefano Giampaoli.*

Atendis nin ĝia direktorino, doktorino Susanna Dal Porto kaj la konsilantino de la Kultura Departemento de la Komunumo Massa doktorino Monica Bertoneri, kiuj akompanis nin dum vizitado de la biblioteko.

Ĉi tiu pluretaĝa biblioteko, ekipita per la plej moderna sistemo, estas ne nur loko por pruntedoni aŭ legi librojn kaj revuojn, sed ankaŭ loko de renkontiĝoj, integriĝo, lernado. Ĝuste okazadis la leciono de legado por infanoj kaj mi havis eblecon partopreni en ĝi. Mi kaj Enrico eluzis tiun tempon ankaŭ por iomete rakonti pri la lingvo Esperanto kaj ankaŭ pri tio, ke dank’ al ĉi tiu lingvo mi vizitas ilian landon.

Admirante la belajn organizitajn librokolektojn, mi estis fiera, aŭdante, ke en la biblioteko troviĝas ankaŭ tradukoj al la itala de libroj de multaj polaj aŭtoroj. Por tralegi librojn de la pola nobelpremiitino Olga Tokarczuk oni devas enskribi sin en atendoliston.

Dank’ al helpo de italaj esperantistoj, Brunella Moracci kaj Enrico Gaetano Borrello, mi havis eblecon, kadre de Erasmus-programo, viziti kelkajn bibliotekojn, ekkoni italan bibliotekan sistemon, gajni novan sperton kaj antaŭ ĉio certigi min, ke amo al legado estas donaco por la tuta vivo.



## Klubo de bona libro

**L**a Biblioteko de Juna Amiko por junuloj kaj infanoj kreskas dank' al viaj proponoj.

Bonvolu sendi viajn proponojn de libroj, kiuj montras pozitivajn valorojn (ekzemple toleremon, amikecon, apogon al malpli fortaj homoj), helpas kompreni vin mem kaj aliajn kaj ebligas adaptiĝi al nia iom malgaja realeco.


La proponojn kun la titolo, la aŭtoro kaj mallonga rekomendo bv. sendi al la supra adreso, aldonante la noton: "Biblioteko de Juna Amiko".

## Rekomendo

**P**or la Biblioteko de Juna Amiko mi rekomendas la libron "Anna de Verdaj Gabloj" de Lucy Maud Montgomery kaj tradukita de Trefflé Mercier. La libron oni povas aĉeti vizitante la paĝaron: <https://www.librejo.com/>

"Anna de Verdaj Gabloj" (angla titolo: *Anne of Green Gables*, 1908) estas romano de la kanada aŭtorino Lucy Maud Montgomery. Kvankam ĝi estis verkita por ĉiuj aĝoj, ĝi estas hodiaŭ konsiderata unu el la klasikaj noveloj por infanoj.

La romano priskribas la vivon kaj aventurojn de Anna Shirley, orfino, kiu en la aĝo de dek unu jaroj estas adoptita



de la gefratoj Mateo kaj Marila Cuthbert, kiuj origine celis adopti knabon, kiu helpu ilin dum la laboro sur ilia farma bieno en la fikcia urbeto Avonlea. "Anna de Verdaj Gabloj" estas tradukita al almenaŭ 37 lingvoj, kun vendoj de pli ol 50 milionoj da ekzempleroj, tiel fariĝinte unu el la plej vaste vendataj libroj en la mondo. La libro estis plurfoje adaptita kiel filmo por kinejo kaj televido kaj eĉ kiel muzikalo.



Dum matenmanĝo en la hotelo kun Ennio Cominetti.



Ennio Cominetti ludas orgenon en la preĝejo Kościół Garnizonowy.



En la preĝejo *Kościół Garnizonowy*.



La grupo "Kolora Integriĝo".

## Ekkonu polan urbon kaj ĝiajn flagon kaj blazonon

Por la kristnaska numero de nia revuo mi proponas etan ŝanĝon en ĉi tiu rubriko. Mi ŝatus dividi kun vi per priskribo de bela urbo *Jelenia Góra* (Cerva Monto) kaj bone pasigita tempo kun amikoj.

La lastaj jaroj alportis al la mondo multajn minacojn, malfeliĉojn, timon kaj deprimon... Ni ŝanĝiĝas...

Ni ne aprezas tion, kion ni havas kaj ja ni povas perdi ĝin facile kaj tre rapide. Mankas al ni bonkoreco, amikeco... Ni ĉesas zorgi pri bonaj interhomaj rilatoj kaj ja kune estas pli facile solvi problemojn, venki krizojn kaj malfacilajn momentojn. Konstruado kaj konservado de bonaj rilatoj postulas multajn faktorojn. Tamen ni respondecas pri niaj elektoj. Ni ĉiam povas ŝanĝiĝi same kiel ni ŝanĝas niajn planojn aŭ revojn. Ni provu krei la magion de bonaj rilatoj en

nia ĉiutageco. Nia vivo havos sencon nur tiam, kiam ni vivas kun aliaj kaj por aliaj. Tion spertis grupo de partoprenantoj de la "Kolora Integriĝo", pri kiu mi ŝatus rakonti al vi. Mi ankaŭ prezentos la belan urbon kaj ĝian legendon, kaj Cristina Bolini priskribos la flagon kaj blazonon de ĉi tiu urbo (fine estas ankaŭ informo pri ŝia libro).

"Kolora Integriĝo" estas projekto por integri grupon de vroclavaj pliaĝuloj ekster sia loĝloko. Ĝis nun ili pasigis tempon kune nur kelkajn horojn, vidante unu la alian mallonge dum renkontiĝoj aŭ programoj organizitaj speciale por ili. Nun ili akceptis alian defion kaj pasigis pli da tempo kune. Dank' al ĉi tiu projekto, ili

povis pli bone koni unu la alian ekster sia propra loka medio, pligrandigi siajn sciojn, konstrui konfidon inter si, akiri novajn spertojn kaj eĉ pruvi inventemon kaj fizikan agadon.

Por realigo de la projekto estis elektita *Jelenia Góra* [elparolu: *jelenia gura*], la urbo situanta en la centro de la Cervomonta Valo (pole: *Kotlina Jeleniogórska*) en la Malsupra Silezio. La titolo "Kolora Integriĝo" estis proponita de Renia



Malgosia kaj Danusia gvidas la programon.





Gładysiewicz kaj bele harmoniis kun la principoj de la aŭtorino de la projekto, Małgosia Komarnicka, kiu kunordigis la integran programon kune kun Dana Durman-Ulatowska. Ela Witkowska estis bonega ĉiĉeronino tra la urbo de sia infanaĝo kaj juneco. La projekto estis efektiva danke al la kunlaboro de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado kun la Vroclava Centro de Socia Disvolviĝo, kiu ebligis financadon el la rimedoj de la Urbo Vroclavo.

La 25-persona grupo de vroclavaj pliaĝuloj alvenis al Jelenia Góra, vendrede la 11-an de Oktobro frumatene. Iza Zobel-Ferrari, prezidantino de la Fondaĵo Maxibene, preparis belan surprizon, organizante speciale por ili miniorganan koncerton de la mondfama orgenisto Ennio Cominetti, kiu tiutage estis en Jelenia Góra. La koncerto okazis en la plej malnova templo de la urbo, la Garnizona Preĝejo. La integriĝaj partoprenantoj vidis kaj admiris la malfacilan teknikon de orgenludado unuafoje. Ĝi estis fascina muzika aventuro. Muziko plenigis ĉiun angulon de la preĝejo kaj ĉiuj sentis ĝian arton, sanktecon kaj belecon. Ili ankaŭ havis la ŝancon viziti la preĝejon kaj ekkoni ĝian historion. Kiel planite, ili



moviĝis direkte al la Urbodoma Placo. Ili preterpasis la ortodoksan Preĝejon de Sanktaj Apostoloj Petro kaj Paŭlo, kiu estas enskribita en la registron de monumentoj. Ili haltis iom pli longe ĉe la Wojanowska Pordego kaj la Kapelo de Sankta Anna. Temas ne nur pri arkitekturaj perloj, sed ĉefe pri atestantoj de la historio de la urbo kaj de la ŝanĝoj en ĝi okazintaj. En la pasinteco, la Pordego permesis eniron en la urbon, kaj hodiaŭ ĝi estas preskaŭ en ĝia centro. Pluirante, la grupo haltis antaŭ la Malgranda Baziliko de Sanktaj Erasmo kaj Pankraco. Tio estas la plej grava templo en la urbo, konstruita en la 14-a jarcento. Plue ili admiris la urbon de la Turo de Kastela Pordego. La Turo iam havis defendan funkcion kaj estis eĉ urba malliberejo. Nuntempe, ĝi estas ĉefe observteraso.

La sekva punkto de la vizitado estis la Turo Grodzka, kiu estas unu el la karakterizaj monumentoj de Jelenia Góra. Hodiaŭ oni povas ludi komfortajn ĉambrojn ĉi tie. La pliaĝuloj atingis la Urbodoman Placon, kiu estas ĉirkaŭita de buntaj barokaj brikdomoj. En la centro de la placo troviĝas la Urbodomo (la sidejo de la urbaj aŭtoritatoj), kiu estas enskribita



La grupo "Kolorowa Integriĝo" inter du afiŝoj.



en la registron de monumentoj. Lacaj, sed kontentaj, ili decidis ripozi ĉe la kafejo “Aroma Cafe”, situanta en unu el la buntaj loĝdomoj. La enirejo odoris je kafo kaj bongustaj kukoj. Post ripozo, la pliaĝuloj decidis daŭrigi vizitadon. Ili rapide iris al la Karkonoŝa Muzeo (pole: *Muzeum Karkonoskie*). En ĝi troviĝas kolektoj, rilataj al la kulturo kaj historio de Karkonoŝo (pole: *Karkonosze*) kaj Malsupra Silezio, sed ankaŭ la plej granda kaj valora kolekto de arta vitro en Pollando. Ĉe la enirejo de la muzeo troviĝas ligna dometo (sube), tipa por la regiono, ekipita per tradiciaj ekipaĵoj uzataj en la 18-a kaj 19-a jarcentoj. (Dekstre supre estas la interno de la muzeo.)

La tago finiĝis per vizito al la “Pordegoj de Tempo” (pole: *Bramy Czasu*), unika tunelkomplekso en la centro de la urbo. Ĝi estis eksterordinara historia vojaĝo,



dank’ al kiu la grupo ekkonis ĉirkaŭ 200 jarojn de la tumultplena historio de Malsupra Silezio, sed ankaŭ la legendojn de la regiono, misteran maŝinon kaj eĉ lumigantan muron.

La grupo revenis al la hotelo por bongusta tag- kaj vesper-maĝo kaj, malgraŭ laceco, preparis “integran vesperon”, kiun ili jam planis dum la vojaĝo al Jelenia Góra. Malgraŭ aktiva tago, neniu rezignis pri la vespera amuzo. Ĉiuj bonege amuziĝis. Ĝi estis vespero de dancoj, muziko, belaj poemoj de Zdzisia Hampel kaj bonega humuro, bonegaj ludoj, enigmoj, konkursoj, rebusoj kaj do konkurado en pozitiva senco (la suba bildo). Pri tio prizorgis Dana Durman-Ulatowska kaj Tereska Krzyżanowska. Dank’ al Irenka Solarek, estis prezentitaj filmetoj kaj fotoj el la partopreno de vrocлавaj pliaĝuloj en la 90-a Itala Esperanto-Kongreso en Montecatini.





Sukcesis ankaŭ la improvizita prezento de la arta programo “Poŝtkarto el Vroclavo (Pocztówka z Wrocławia)” kaj la invito de la publiko kune danci.

La sekvan tagon, sabaton, la 12-an de Oktobro, la partoprenantoj daŭrigis vizitadon de Jelenia Góra. Ili dividiĝis en du grupojn. Unu grupo vizitis la lokon kie la urbo estis fondita kaj la alia vizitis ĝian banurboparton, Cieplice.

Laŭ la legendo Monteto de Krzywousty (legu: kŝivousti; pole *Wzgórze Krzywoustego*) estas la loko, kie Jelenia Góra estis fondita. Antaŭe sur la monteto estis ruinoj de Piast\*-kastelo kaj hodiaŭ tie ekzistas 35-metra turo, nomita Fungeto (pole: *Grzybek*) pro ĝia formo. Ĝi estas bonega loko por rigardi panoramon de Jelenia Góra, la Cervomonta Valo kaj la Karkonoŝaj Montoj.

La vojo al la turo estas ege pitoreska kaj gardata de lignaj skulptaĵoj de Piast-

militistoj (4 kaj 5 metrojn altaj). Proksime, pliaĝuloj admiris la Fervojan Viadukton, kiu estas pendigita 40 metrojn super la rivero Bóbr (legu: bubr) kaj la Miraklan Fonton. Akvo de la Fonto, laŭ informoj, restarigas sanon, junecon kaj eĉ riĉecon, sed ankoraŭ nenio al iu plenumiĝis...

En Cieplice, banurboparto de Jelenia Góra, la grupo vizitis la Naturhistorian Muzeon, kies kolektoj estas kolektitaj ekde la 16-a jarcento. La pliaĝuloj admiris milojn da naturaj specimenoj kaj riĉan kolekton de mineraloj kaj fosilioj. La Pavilono kaj Norvega Parko faris bonegan impreson. La Pavilono estas ligna strukturo simila al vikinga boato. La parkoj estas hejmo de pluraj dekuoj da specioj de arboj kaj arbedoj, kaj la lageto tie estas loĝita per akvobirdoj. La bela aŭtuna vetero kaŭzis, ke la partoprenantoj de integriĝo meditis en la parko kaj eĉ dancis...

En Jelenia Góra grupo de vrocлавaj pliaĝuloj pasigis belajn kaj neforgeseblajn momentojn. Kun bedaŭro, post bongusta tagmanĝo en la hotelo, ili forlasadis ĉi tiun belan kaj riĉan je monumentoj urbon. Ili sukcesis ligi aktivecon kaj ripozon, ekkoni interesajn pejzaĝe lokojn, admiru belan arkitekturon kaj sperti bonegan aventuron.

Ĉiuj rimarkis, ke ĉi tiu vojaĝo montriĝis ne nur trezoro de scio pri la vizititaj lokoj, sed antaŭ ĉio ĝi konsciigis ilin, kiel gravas pasigi tempon kune kaj ĝi instruis al ili ĝui ĉiun momenton. La partoprenantoj de la “Kolora Integiĝo” deklaris, ke la kapablo kunlabori estas pli grava ol konkurado, kaj la mirindaj memoroj kolektitaj dum integriĝo restos kun ili dum longa tempo kaj certe helpos ilin venki negativajn momentojn de la ĉiutageco. Ili nun ridetos pli ofte kaj kultivos bonajn emociojn, ili reagos pli milde al nervozaj situacioj kaj serĉos avantaĝojn prefere ol malavantaĝojn.



\*) Piast: estis laŭlegenda prapatro de la Piast-dinastio († ĉ. 870).





## Flago kaj blazono **Legendo**


**J**elenia Góra estas urbo en la sudokcidenta parto de Pollando, apartenanta al Malsupra Silezio, proksime al Ĉeĥio. La historio de la urbo estas komplika. Ĝi apartenis al Pollando, Prusujo kaj Ĉeĥio.

La flago de la urbo estas rektangulo, dividita en tri egalajn horizontalajn striojn: blanka, flava kaj ruĝa. La blazono de la urbo estas metita en ĝian supran dekstran angulon. Blanko kaj flavo estas koloroj de Silezio, blanko kaj ruĝo estas tradiciaj polaj koloroj.

La urba blazono de Jelenia Góra estas ruĝa cervo sur arĝenta ŝildo, dekstre, staranta sur tri verdaj montoj. En sia buŝo la cervo tenas tri orajn glanojn ligitajn per unu verda tigo, simila al trifolio.

Dum la Tridekjara Milito, la blazono estis ŝanĝita memvole kaj antaŭ ĉio oni kreis falsan blazonan diplomon por ricevi specialajn privilegiojn. La ekzistanta cervo estis enmetita en la dukoloran kaj dukampan blazonon. Nur en 1937 estis restarigita la origina aspekto de la blazono de Jelenia Góra.

La aspekto de la blazono estas rilatita al la legendo devenanta de la tempoj de Bolesław Krzywousty (legu: Bolesław Kšivousti). Laŭ ĝi la princo pafvundis cervon dum ĉasado kaj tiam postkuris ĝin. La cervo nur ŝajnis esti vundita ĉar ĝi volis montri belecon de la loko. La princo konstruis fortikan kastelon ĉi tie en 1108.



## Legendo

**M**i proponas legendon pri kaŝita trezoro. La trezoron vi povas trovi alveninte al Jelenia Góra.

Se vi dum la Antaŭkristnaska Vespero, aŭ dum la Nokta Meso staros ĉe la observturo “Fungeto” kaj rigardos al la konstelacio Ĝemeloj vi vidos vojon al la kaŝejo.

## Trezoro de templanoj

**E**n la jaro 1313 la templanoj, survoje al Romo, kaŝis trezoron en la Piast-kastelo. La trezoro stimulis la imagon de la loĝantoj de Jelenia Góra. Dum jarcentoj la trezoro ne estis trovita. Ĝin gardis fantomoj kaj la enirejo aperadis nur je noktomezo je la Antaŭkristnaska Vespero, en unu loko, kie antaŭe staris kastelo. Tiu ĉi loko estis trovita en la 18-a jarcento de unu el la loĝantoj de Jelenia Góra. Noktomeze, dum Antaŭkristnaska Vespero, li rimarkis nigran makulon en la neĝo. Ĝi estis kavo kaj ŝtuparo. Li malsupreniris, ekvidis alian ŝtuparon kaj iris pli kaj pli profunden. Fine li atingis misteran ĉambbron plenan de juveloj. Li plenigis siajn poŝojn kaj sakon kaj revenis hejmen. Li ne fanfaronis pri sia sukceso.

La sekvan jaron li denove iris al la sama loko, sed prenis pli grandan sakon kaj ankaŭ sukcesis. En la tria jaro, la sakoj plenigitaj per valorajoj estis tiel pezaj, ke li ne sukcesis foriri dum la difinita tempo kaj fariĝis fantomo. Tiel oni punis lian avidecon.

\*Ĉeti paperan aŭ e-pub version de la libro de Cristina Bolini vi povas ĉe <https://www.youcanprint.it/flagoj-historio-kaj-kuriozajoj/b/5fd68326-c8db-52f2-9adb-1ab36264316e>; aŭ ĉe: [https://www.amazon.it/Flagoj-Historio-kurioza%C4%B5oj-Cristina-Bolini/dp/B0B282PDNK/ref=sr\\_1\\_1?\\_\\_mk\\_it\\_IT=%C3%85M%C3%85C5BD%C3%95C3%91&crid=ZDPUGKNV1ZTA&keywords=Flagoj&qid=1675710277&prefix=flagoj%2Caps%2C177&sr=8-1](https://www.amazon.it/Flagoj-Historio-kurioza%C4%B5oj-Cristina-Bolini/dp/B0B282PDNK/ref=sr_1_1?__mk_it_IT=%C3%85M%C3%85C5BD%C3%95C3%91&crid=ZDPUGKNV1ZTA&keywords=Flagoj&qid=1675710277&prefix=flagoj%2Caps%2C177&sr=8-1)



# Novrestarigita Komisiono de UEA por Virina Agado

**E**n Esperantujo, jam ekde ĝia plej frua historio, esperantistinoj rolis grave en konstruado de la E-movado.

Ekde la fino de la 70-aj kaj ĝis la fino de la 80-aj jaroj de la pasinta jarcento, funkciis Komisiono por Virina Agado de UEA (KVA). Ĝia agado estis malfacila, ĉar okazigi kunsidon ne estis tiel facile kiel nun kun reta komunikado. Anna Löwenstein, tiam Anna Brennan fondis kaj redaktis la revuon “Sekso kaj egaleco” inter la jaroj 1979 – 1987. Tiu ĉi revuo publikigis novaĵojn pri virina agado ĉirkaŭ la mondo.

Post preskaŭ 40 jaroj da malapero de KVA, esperantistinoj komencis rete renkontiĝi de la jaro 2022 kaj de tiu tempo organizi programojn kadre de Virina Agado. Per tiuj agoj ni plej simple montras forton kaj saĝecon de virinoj en ĉiuj vivkampoj. UEA akceptis la proponon de Virina Agado restarigi la Komisionon por Virina Agado kaj de tiam formale aganta Komisiono decidis, ke ĝi estos trinivela:

Komisiono (5 personoj): Małgosia Komarnicka (Pollando); Alessandra Madella (Italio/Ĉinio); Miora Raveloharison (Madagaskaro); Ariadna Garcia Gutierrez (Kubo); Arko (Gong Xiaofeng) (Ĉinio).

Konsilantaro (5 personoj): Anna Lowenstein (Anglio); Mirejo Grosjean (Svislando); Luiza Carol (Israelo); Maritza Gutierrez (Kubo); Alexandrine Omba (DRKongo).

Aktivulinioj: la Komisiono bonvenigas ĉiujn esperantistinojn aliĝi (*virina-agado@groups.io* aŭ *virina.agado@esperanto.org*).

Novrestarigita Komisiono por Virina Agado signifas novan oportunon



aŭdigi la voĉojn de la virinoj en plej diversaj mondopartoj, kie ili suferas diskriminacion pro plej diversaj kialoj kaj iliaj rajtoj estas silentigitaj. La celo de la Komisiono estas labori por la egalrajtigoj de virinoj, ilia aktivigo, memevoluo, sano kaj memfido. Ĉiu virino, sendepende de nacieco, aĝo aŭ religio, havas la rajton decidi pri sia vivo, edukado, serĉado de siaj propraj celoj, laboro, kariero, sekureco...

Nome de la Komisiono  
**Małgosia Komarnicka** (Pollando)  
kaj **Gong Xiaofeng** (Arko) (Ĉinio)  
[Pli da informoj vi trovos ĉe *uea.facila.*]

## Virinaj agadoj en frua periodo de Esperanto-movado

**E**n Esperantujo, jam ekde ĝia plej frua historio, esperantistinoj rolis grave en konstruado de la E-movado.

La Komisiono por Virina Agado decidis prepari liston de elstaraj esperantistinoj, kiuj pene laboris en la frua periodo de Esperanto-Movado. Bonvolu esplori vian lokan historion kaj prezenti pionirinojn, kies rolo ne decas esti forgesita. Ĉi tiujn informojn bonvolu sendi al *virina-agado@groups.io* aŭ *virina.agado@esperanto.org*

La Komisiono deziras prezenti virinojn de frua periodo de esperanto-movado per



Virina agado

iliaj agoj. Tiuj virinoj agis en malfacilaj tempoj, en kiuj oni traktis ilin kiel neplenaĝaj kun tre supraĵa (malprofunda) edukado, kiu malebligis memstaran ekzistadon. Tiuj virinoj agis kun pasio, determino kaj kuraĝo malgraŭ, ke ili vivis dum tempoj kiam ekzistis malmulte da loko por ili en la publika vivo. Ili ne kliniĝis sub la premo de la kontraŭaĵo de sorto, ili estis pionirinoj, kiuj kuraĝe sekvis siajn celojn kaj kontribuis al la evoluo de nia Movado kaj al la disvastigo de informoj pri la lingvo Esperanto. La unua el tiuj gravaj virinoj estis Klara Zamenhof, ĉiama kunlaborantino kaj helpantino de sia edzo.

**Malgosia Komarnicka**

## Klara Zamenhof – la patrino de Esperanto

**K**lara “Kejla” Zamenhof naskiĝis la 5-an de Oktobro 1863 en Kovno (Kaŭno – tiama Rusia Imperio). Ŝi estis filino de Aleksandro (Sender) Lejbovich Silbernik kaj Goda Mejerovna Silbernik. En Esperanto ŝia denaska familia nomo foje estas literumata “Zilbernik”. Ŝi havis ok gefratojn.

Ŝia familio ne estis tre riĉa, sed bonhava. Ŝia patro posedis malgrandan salfabrikon en Kovno, en kiu li persone laboris ĝis 74-a jaraĝo de sia vivo. Rigardante ŝiajn fotojn el juneco ni vidas belan, agrablan kaj mildan personon. Tamen rigardante ŝiajn fotojn el pli malfrua vivperiodo, ŝi jam aspektas serioze kaj preskaŭ ne ridetas.

Legante pri ŝi oni ekscias, ke ŝi ankaŭ estis grandanima, optimisma kaj ĉiam scipovis doni kuraĝon al sia edzo dum malfacilaj momentoj... Estante bonega dommastrino kaj samtempe fariĝante aktiva esperantistino, ŝi partoprenis ankaŭ en ĉiuj malagrablaĵoj, kiujn kaŭzis laboro


de sia edzo por Esperanto. Ludovikon Zamenhof Klara ekkonis en la jaro 1886, vizitante sian fratinton, kies edzo estis lia amiko. La 30-an de Marto 1887 ŝi jam estis lia fianĉino kaj la 9-an de Aŭgusto ŝi fariĝis lia edzino. Klara ekamis ne nur la belstaturon de sia edzo, sed ankaŭ liajn animon kaj pensojn. Ŝi esperantistiĝis en 1887 (aŭ pli frue). Ŝi flue parolis ne nur la polan kaj jidan, sed ankaŭ Esperanton. Ŝi forte subtenis Esperanton, materiale kaj morale. Ŝi senhezite fordonis sian tutan doton por la eldono de la Unua Libro, en la jaro 1887. Ŝi fariĝis ĉiama kunlaborantino kaj helpantino de sia edzo, plenumanta liajn administrajn kaj sekretariajn taskojn.

Ŝi oferis sian tutan tempon por disvastigi grandan eltrovaĵon de sia edzo, partoprenante kun li en sukcesoj kaj en problemoj... Ŝia patro ankaŭ ludis tre gravan rolon en la historio de Esperanto. Li finance subtenadis la familion de sia filino kaj eĉ perfekte ellernis Esperanton malgraŭ sia maljuna aĝo.

**Malgosia Komarnicka**  
(Daŭrigo venontnumere.)



Klara Silbernik  
Zamenhof



Rubrikestro:  
Elena Nadikova,  
la gvidantino  
de Esperanto-klubo  
“Betuleto”, Rusio.  
*lena\_espero@mail.ru*



## Perlo de Oriento...

### Saluton, karaj legantoj!

Eble, vi aŭdis, ke sekvontjare, en 2025, la vica 43-a sesio de Ĝenerala Konferenco de UNESKO okazos en Samarkando, Uzbekio.

**Ĉ**u povas esti, ke iuj el vi partoprenos? *Interkultura Mondo* tre salutas tion kaj ĉi-numere proponas iom prepariĝi al la vojaĝo.

*Juna Amiko* jam prezentis iom Samarkandon, kiam ĝi rakontis pri du interesaj projektoj de lokaj esperantistoj: Internaciaj Letertagoj kaj “Vojaĝo en la Fabelan Mondon de Novjaraj bildkartoj” (vidu la artikolon “Leteroj por orienta fabelo...”, JA-2019/1). Ĉi-foje ni daŭrigos la temon kaj prezentos al vi pli detale unu el la orientaj fabeloj de la mondo.



La lando Uzbekio (Uzbekistano) situas en Centra Azio. Ĝia oficiala nomo estas Respubliko Uzbekistan. La areo havas 448,9 mil kvadratajn kilometrojn. Ĝia teritorio inkluzivas ebenaĵojn kun

montetoj, dezertojn kaj montojn. La loĝantaro iom plias 37 milionojn da homoj. Uzbekio estas sufiĉe juna lando: pli ol duono da loĝantoj havas malpli ol 30 jarojn. 35 % da loĝantoj estas infanoj ĝis 14 jaroj. La ĉefurbo estas Taŝkento.

Uzbekio estas unu el la plej antikvaj regionoj de la mondo. La respubliko famas pro siaj moskeoj, maŭzoleoj, sanktaj lokoj de islamo kaj aliaj religioj kaj pro konstruaĵoj laŭ la Granda Silka Vojo. En Uzbekio situas kvar lokoj de Tutmonda Heredaĵo de UNESKO: la fortikaĵo Iĉan-Kala en la urbo Ĥiva; la urboj Buhara, Samarkando kaj Ŝahrisabz.

La lando havas mirinde riĉegan kulturen heredaĵon, kiu estas fakte kunfandiĝo de multaj kulturaj tradicioj. Internaciaj esploristoj opinias, ke en Uzbekio situas pli ol 4.000 da mondscale gravaj histori-kulturaj monumentoj. Ĉi-tie vi povas fakte viziti kaj vidi veran antikvan Orienton.

La lando gloras ankaŭ pro siaj popolaj metioj: tapiŝ-teksado, ligno-ĉizado, arto de pupo-farado, juvelaĵ-arto



Placo Registan – antikva forumo de Samarkando.



Placo Registan – antikva forumo de Samarkando.  
Foto de Anatolij Ionesov.



kaj ceramiko... Estas ankaŭ multe da kuraĉlokoj en la lando. En Uzbekio vi trovos multajn mirindajn faktojn. Ekzemple, uzbekoj trinkas teon tute alimaniere: oni trifoje verŝas teon en tason kaj denove forverŝas al tejuo antaŭ ol komenci trinki.


En Uzbekio situas multaj antikvaj urboj, ligitaj kun la Granda Silka Vojo: Taŝkento, Samarkando, Buĥara, Ĥiva, Termez, Margilan kaj aliaj. En tiuj urboj konserviĝis multaj historiaj kaj arkitekturaj vidindaĵoj.

Inter tiuj urboj vere brilas Samarkando, samaĝulo de antikvaj Ateno, Romo, Babilono kaj Nankino. Iam oni nomis Samarkandon “Perlo de Oriento”, voj-kruciĝo de mondaj scienco, komerco, kulturoj. Ĉi-tie renkontiĝas Oriento kaj Okcidento, Sudo kaj Nordo. Ĝia impona historia heredaĵo, neripetbla kolorriĉeco de originala orienta arkitekturo admirigos ĉiujn postulemajn okulojn. Dum kelkaj jarcentoj Samarkando estis fama ekonomia kaj kultura centro en Granda Silka Vojo kaj poste en mezepoko iĝis ĉefurbo de la Imperio de Timur. La urbo allogis sciencistojn kaj religiajn aŭtoritatojn,

komercistojn kaj invadantojn. UNESKO nomis Samarkandon Vojkruciĝo de kulturoj. Same merite Samarkando havas titolon Monda ĉefurbo de kultura turismo (UNWTO). Vi vidos ĉi tie moskeajn kupolojn, marmorajn placojn, neĝajn montojn. La urbon tre alte taksis en sia tempo – antaŭ pli ol 2.000 jaroj – Aleksandro la Granda. Pasinteco renkontiĝas ĉi tie kun estonteco kaj harmonie vivas kune.

Samarkando gloras pro siaj multaj vidindaĵoj. Laŭ unu el opinioj, la nomo “Samarkando” el tjurka lingvo signifas “riĉa urbo”. Tiun nomon oni donis al la urbo unuavice pro ĝiaj belegaj

Samarkando. Ensemblo Ŝahi-Zinda.  
Sur antikva strateto.  
Foto de Anatolij Ionesov.







monumentoj kaj riĉega kulturo. La plej fama placo de Samarkando estas la Placo Registan, kie situas tri antikvaj madrasoj – islamaj lernejoj. Oni konsilas ĝui ĝin dum diversaj tempoj de tagnoktoj.

La loĝantoj de Samarkando estas tre gastemaj. La lando starigis kiel unu el siaj ĉefaj direktoj – malfermecon por turismo. Do, karaj legantoj, Vi povos mem kontroli tion, se Vi vizitos sekvontjare Uzbekion – la landon de la 43-a sesio de Ĝenerala Konferenco de UNESKO. **Bonvenon al la antikva Samarkando!**

En tiu magia urbo antaŭ pli ol 30 jaroj naskiĝis tre interesa projekto – “Samarkandiana”. Kiel rakontas la aŭtoro kaj prizorganto de la enciklopedia projekto “Samarkandiana” Anatolij Ionesov: *“La ideo aperis tute subite. El Usono venis mesaĝo, ke en malproksima Kalifornio en la urbo Santa-Barbara ekzistas strato kaj la tuta distrikto kun la nomo Samarkand. Tio, certe, mirigis nin, sed samtempe aperigis la ideon: serĉi aliajn kulturajn reprezentojn de la fama urbo*




Anatolij Ionesov.

*en aliaj lokoj de la mondo. Tiel naskiĝis nova enciklopedia projekto kaj komenciĝis grandega esplora laboro. Miloj da leteroj estis dissenditaj al diversaj urboj kaj landoj. La anoncoj pri la projekto estis publikigitaj en pluraj eksterlandaj periodaĵoj. Kaj rezultoj, mirinde, okazis multaj. Samarkandaj bulvardo kaj stratoj en diversaj urboj de Rusio. Stratoj Samarkand en Sevilla, Hispanio, en Dubai, UAE, Villachiaro, Italio, en Ammano, Jordanio. Hoteloj, vendejoj, restoracioj, kompanioj “Samarkand” en Francio, Italio, Hispanio, Usono kaj aliaj landoj. Multaj literaturaj, muzikaj kaj pentroartaj verkaĵoj, dediĉitaj al Samarkando. Ĉu vi scias, ekzemple, ke ekzistas aparta speco de ŝakludo – Samarkand? Ĉi havas aldonajn figurojn kaj ili staras sur la 100-kvadrata tabulo”.*

Tiujn kaj multajn aliajn interesajn faktojn donacis kaj donacas

### Du eldonoj de la libro:



### SAMARKAND: THE IMAGE OF THE CITY IN THE SPACE OF INTERCULTURAL COMMUNICATION. AN ENCYCLOPEDIA OF FOREIGN SAMARKANDIANA

Authors:

Anatolij Ionesov, Vladimir Ionesov

Managing Editor:

Rector of SIUT, Doctor of Pedagogical Sciences,  
Professor Yusuf Abdullaev



Ensemblo Ŝahi-Zinda. Familio sur antikva strateto. Foto de Anatolij Ionesov.

al legantoj la libro de Anatolij Ionesov kaj Vladimir Ionesov “Samarkando: Bildo de la urbo en la spaco de interkultura komunikado. Enciklopedio de eksterlanda Samarkandiana”, eldonita de Samarkanda Internacia Teknologia Universitato (SIUT, 2022/2023). Kaj, kompreneble, la projekto havigas multegajn novajn amikojn kaj partnerojn! Ĉiujn unuigas amo al unika Samarkando – Perlo de Oriento. **Ankaŭ Vi, karaj legantoj, povas esprimi vian estimon kaj amon al magia orienta fabelo...**

Ja tio tre facilas pere de nia bonega lingvo Esperanto! La projekto “Internaciaj Letertagoj” ene de “Samarkandiana” sukcese funkcias ĝis nun. “Vorto pri Samarkando 2024” alvenigis multnombrajn diverslingvajn salutemesaĝojn kaj aliajn kontribuadojn el plej diversaj partoj de la terĝlobo.

Ankaŭ ĉi-jare gratulmesaĝojn sendis multaj eminentaj personoj. Inter ili, ekzemple, la franca pentristino kaj skulptistino, la ambasadoro de Bona volo de UNESKO; la direktoro de la Lernejo pri ĵurnalismo de San-Diega ŝtata universitato el Usono; la direktoro de nacia muzeo el Mjanmo; itala komponisto; bulgara verkisto; francaj, germana, itala, rusia, usona sciencistoj; dana, japana, usona pedagogoj; germana pentristino, brazila eldonisto, irlanda diplomato, korea psikologo, ĉina inĝeniero kaj multaj aliaj homoj el diversaj landoj de la mondo.

***Do, vere interkultura unuigo, al kiu povas malhelpi neniu militaj konfliktoj kaj politikaj polemikoj!***

*“Kiel ĉiam, la letertaga projekto estas adresita ne nur al la Esperanto-komunumo, sed ankaŭ ekstermovaden, – klarigas Anatolij Ionesov. – Proksimume duono de la partoprenintoj (aŭ iom pli) estis neesperantistoj, inkluzive konatajn diverslandajn sciencistojn, kulturajn agantojn, Honorajn civitanojn de Samarkando, ktp.*

*Pluraj leteroj aperis papere kaj rete en la regionaj kaj tutlandaj periodaĵoj. Esperanto estis menciata diversloke en la gazetartikoloj. Kelkaj mesaĝoj estis publikigitaj de la redakcioj pli ol unufoje”.*



Samarkando. Maŭzoleo Gur-Emir. Foto de Anatolij Ionesov.




Jen nur kelkaj ligiloj:

<https://sv.zarnews.uz/post/slovo-o-samarkande-planeta-pozdravlyayet>  
<https://sv.zarnews.uz/post/slovo-o-samarkande-zvuchit-so-vsex-ontinentov>  
<https://sv.zarnews.uz/post/sol-jizni-samarkand>  
<http://ovozi.uz/60606/>  
<https://telegra.ph/Pochtovyj-marafon-Slovo-o-Samarkande-2024-10-15>  
[https://uz.tgstat.com/ru/channel/@gazeta\\_lady/2099](https://uz.tgstat.com/ru/channel/@gazeta_lady/2099)  
<https://telegra.ph/Pochtovyj-marafon-Slovo-o-Samarkande-2024-Okonchanie-10-22>  
<https://sv.zarnews.uz/post/slovo-o-samarkande-2024>

*Krome, la Internaciaj Letertagoj kaj kelkaj kontribuajoj estis prezentitaj surekrane dum la solena aranĝo, omaĝe al la Tago de la urbo, organizita de la Samarkanda Internacia Teknologia Universitato (SIUT), kiu rolis kiel oficiala partnero de la 2-monata poŝta maratono "Vorto pri Samarkando":*  
<https://siut.uz/en/press-center-en/news-en/1373-samarkand>

La imponan solenaĵon partoprenis reprezentantoj de pli ol 20 landoj: Usono, Sud-Afriko, Kamerunio, Japanio, Ĉinio, Koreio, Barato, Irano, Palestino, Turkio,



Samarkando. Placo Registan.  
 Madraso Ŝer-Dor.  
 Fotoj de Anatolij Ionesov

Ĉeĥio kaj aliaj. La 18-an de Oktobro oni festas en Samarkando Tagon de la urbo. Do, karaj legantoj, gratulu sekvontjare "Perlon de Oriento" kaj sendu viajn salutojn kaj bondezirojn! ***Kaj Esperanto vere faros Samarkandon la loko de renkontiĝo de popoloj kaj kulturoj, tradicioj kaj ideoj, do, sekve, la loko de paco kaj amikeco!***

***La artikolo estas kompilita pere de malfermitaj informoj tra la ruslingva parto de Interreto kaj materialoj, disponigitaj de Anatolij Ionesov – la fondinto de Samarkanda klubo de internacia amikeco "Esperanto", aŭtoro kaj prizorganto de la Enciklopedia projekto "Samarkandiana", al kiu Interkultura mondo esprimas koran dankon!***



Samarkando. Muzeo de Mirzo Ulughbek.  
 Foto de Anatolij Ionesov.



# La 3-a Komuna Kongreso de Japanio kaj Koreio



**De la 2-a ĝis la 7-a de Oktobro 2024 mi vizitis Koreion por partopreni en la 3-a Komuna Esperanto-Kongreso de Japanio kaj Koreio.**

**G**i okazis en la ĉarma urbo Jeonju, paralele al la 6-a Esperanto-Forumo inter Shanghai kaj Seulo. Mi vojaĝis kun grupo de Zaozhuang-Universitato, gvidata de Sun Mingxiao (Semio). Ni unue veturis aŭte al la flughaveno de Qingdao kaj de tie ni flugis al Seulo, kie gastame bonvenigis nin ĉe la Konfucea Instituto de Hankuk-Universitato de Fremdlingvaj Studoj Lee Young-Koo, honora prezidanto de Korea Esperanto-Asocio kaj de la universitato mem. Estis kun li lia kolego Na Mingu, estro de la Konfucea Instituto kaj de la Ĉina Departamento. Ili kune akceptis kaj reciprokis la donacojn pretigitajn de Zaozhuang-anoj, inkluzive de longa rulaĵo kun pentraĵoj de Zhu Lirong pri la Silka Vojo kaj de la libro Mengzi, esperantigita de Sasaki Teruhiro dum sia loĝado en Zaozhuang. Interese estis poste havi kunsidon en art-galerio kun la prezidanto de la Korea-Ĉina Asocio, Lee Sungwoo, kiu akompanis nin sperti tipan korean glaciaĵon en moda loko, kie amikoj kaj paroj kune manĝas per siaj kuleroj el granda bovlo. Por alveni tien, ni promenis tra la centro de Seulo, kie homoj protestas, turismas aŭ trankvile sidas surplanke laŭlonge de kanalo, legante librojn, kiujn ili prunteprenas de subĉiela biblioteko.

La tagon poste, ni veturis suden al la kongresurbo per trajno kaj tuj iris al la kongresejo, kiu troviĝis ene de la Jeonju Nacia Universitato de Pedagogio. Estis tuj varma sento revidi tiom multe da konataj vizaĝoj. Kvankam ĝis tiam mi povis pasigi en Koreio nur unu vesperon kaj nokton, helpate de Lee Jungkee, bonŝance koreaj samideanoj multe vojaĝemas kaj ofte vizitas kongresojn, kie ili impresas ĉiujn per sia viglo, bonhumoro kaj kapablo danci. Mi fakte lernis ĉi-foje, ke unu el la ĉefaj distraĵoj de koreaj samideanoj estas frekventi kune dancokursojn. Kio

faras tiel, ke ili estas averaĝe pli feliĉaj ol la restanta parto de la korea popolo. Ankaŭ ĉi tie ĉiumatene estis internaciaj lecionoj kun profesia instruistino por lerni la movojn, kiuj akompanas la tradician kanton "Ariran". Ni faris tion en klasika ligna pavilono laŭlonge de la rivero, en kiun oni povis eniri nur forprenante siajn ŝuojn. Brile tradukis la simpatia kaj tre dancema Jesa.

Bonŝance la universitato troviĝas en tre tradicia kvartalo de la urbo, kie ni povis sperti la plej bongustan rizajon "bibimbap" el Koreio kaj dormi surtate en hotelo, konsistanta el dometoj ĉirkaŭ korto. Kun flagoj kaj verdaj steloj, pentritaj survizaĝe, ni paradis tra la centra vojo inter junuloj, luantaj koreajn vestojn por fotoj, pied-masaĝejoj kaj aŭguristejoj, kantante "Esperanto estas kie? Esperanto estas ĉie!", sub la gvido de la nelacigebla indonezia amikino Ilia Dewi.


Reveninte al la kongresejo ni havis la plezuron spekti mirindan popolan teatraĵon, kiu rakontis pri junulo, kiu devis iri labori al la urbo kaj mortis. Sed ĝi faris tion donante grandan senton de komunumo, per ritoj, kantoj kaj dancoj, inkluzive de unu protektata kiel nemateria kultura heredaĵo fare de UNESKO. La rakontisto speciale ŝanĝis la vortojn por enmeti "Esperanton" en ilin.

Tre malstreĉiga kaj bonveniga loko en la ĉefa strato, kiun nia parado trairis, estas la butikoj de Lee Mikyeong (Radika). Ŝi adaptas la arton pentri ventumilojn, kiun ŝi lernis de la plej fama majstrino el Koreio al Esperantaj temoj. Ŝi ornamas la butikon per grandaj ventumil-portretoj de Zamenhof, Hector Hodler, Edmond Privat kaj Lee Chong-Yeong. Kaj samideanaj vizitantoj ricevas kolorajn feltoplumojn, por mem dekoracii sian tigran aŭ peonian ventumilon. Do, estas tre bona loko por infanoj kaj bela ekzemplo de la persona varmo kaj ĉarma afableco, kiun ni daŭre spertis en Koreio kaj kiu igis tiun internacian kongreseton kun homoj el 16 landoj vere neforgesebla.

(Fotoj dorspaĝe.)  
**Alessandra Madella**



La rubrikon  
prizorgas:  
Stefan MacGill



# Majstra mamula mistero

En la klasĉambro la instruistino starigas demandojn al la lernantoj:

– “Kiu povas nomi du tropikajn fruktojn?”  
– “U! U! U! Mi povas nomi ilin!”, respondas Joĉjo, svingante la manon kiel freneziĝinta ventmuelilo por peti respondo-raĵton.  
– “Bone, Joĉjo, bonvolu respondi.”  
– “Bananon kaj ananason!”  
– “Bona respondo! Jen la sekva demando: kiu povas nomi du farmbestojn, kaj kion ili donas al ni?”  
– “U! U! U! Mi povas nomi ilin!”, krias Suzana, svingante la manon vige kaj entuziasme, kiel palmarbo en hurikano.  
– “Bone, Suzana, bonvolu respondi.”  
– “La ŝafo donas lanon kaj la bovino donas lakton!”  
– “Bona respondo! Jen la sekva demando: kiu povas nomi du danĝerajn reptiliojn?”  
– “U! U! U! Mi povas nomi ilin!”, respondas Daĉjo, svingante la manon kiel tiu de la vosto de ebria kanguruo. “Krokodilo kaj venena serpento!”  
– “Bona respondo! Jen la sekva demando: kiu povas nomi tri mamulojn, kiuj kapablas flugi?”  
– “U! U! U! Mi povas nomi ilin!”, respondas Steĉjo, svingante la manon kiel la flugiloj de kolibro. >>>>  
– “Bone, Steĉjo, bonvolu respondi.”  
– “Vesperton...”.  
– “Bone, jen unu, donu ankoraŭ nur du respondojn!”  
“Piloton kaj stevardinon en aviadilo.”



## ① Ligu la frazojn per kiu, kiuj, kiun aŭ kiujn:

- Bananoj kaj ananasoj estas fruktoj, \_\_\_\_\_ estas tropikaj.
- Bovino estas besto, \_\_\_\_\_ donas al ni lakton.
- Venenaj serpentoj kaj krokodiloj estas bestoj \_\_\_\_\_ ni ege timas.
- Bovinoj kaj ŝafoj estas farmbestoj, \_\_\_\_\_ utilas al ni. Bestoj, \_\_\_\_\_ ni amas.
- Ŝafo estas besto, de \_\_\_\_\_ ni tondas la lanon.
- Vesperto estas mamulo, \_\_\_\_\_ kapablas flugi.
- Suzana, \_\_\_\_\_ loĝas en farmbieno, diras: “Ŝafo estas besto \_\_\_\_\_ mi ege amas.
- Hurikanoj estas ŝtormoj, \_\_\_\_\_ estas ege danĝeraj

Via sumo el dek poentoj:

## ② Jen vortoj en la rakonto. Sed la literoj estas en misa ordo:

- |                 |               |
|-----------------|---------------|
| 1. KROKODILO    | 7. FARBESTO   |
| 2. SVINGANTE    | 8. DANĜERAJ   |
| 3. FRENEZIĜINTA | 9. KLASĈAMBRO |
| 4. HURIKANO     | 10. VENENA    |
| 5. KANGURUO     | 11. KOLIBRO   |
| 6. VESPERTON    | 12. MAMULO    |

Via sumo el 12 poentoj:

## ③ Konu vian propran landon!

- Ĉu en via lando kreskas bananoj?
- Ĉu en via lando estas krokodiloj?
- Ĉu en via lando vivas vespertoj?
- Ĉu en via lando vivas pilotoj?
- Ĉu en via lando kreskas palmarboj?
- Ĉu en via lando vivas hurikanoj?
- Ĉu en via lando estas ventmueliloj?



- 8. Ĉu en via lando kreskas ananasoj?
- 9. Ĉu en via lando estas ebraj kanguruoj?
- 10. Ĉu ĉe vi estas sobraj kanguruoj?

Via sumo el dek poentoj:

### 4 Ĉu vera aŭ malvera?

- 1. Piloto laboras en vapora lokomotivo.
- 2. Suzana svingis la manon kiel palmarbo en hurikano.
- 3. Steĉjo diras, ke vesperto estas mamulo.
- 4. Daĉjo nomis du danĝerajn reptiliojn.
- 5. Joĉjo svingis la manon kiel ebria kanguruo.
- 6. Piloto estas mamulo. – ĉu vi flugus se via piloto estas venena serpento?
- 7. Banano estas mamulo.
- 8. Ananaso estas tropika frukto..
- 9. La bovino donas lanon kaj la ŝafo donas lakton.
- 10. Steĉjo svingis la manon kiel la piedfingroj de kolibro

Via sumo el dek poentoj:

### 5 Ligu kaj fraz-komencojn kun la fraz-finoj:

- 1. Serpento estas...
- 2. Ananaso estas...
- 3. Joĉjo svingis la manon ...
- 4. Daĉjo svingas la manon...
- 5. Kiu povas nomi ...
- 6. Ŝafo kaj bovino estas...
- 7. Vesperto estas...
- 8. La instruistino starigas demandojn...

\*\*\*\*

- A: kiel ebria kanguruo.
- B: mamulo, kiu kapablas flugi.
- C: al la klasanoj.
- Ĉ: farmbestoj
- D: tri mamulojn, kiuj povas flugi?
- E: reptilio.
- F: tropika frukto
- G: kiel freneziĝinta ventmuelilo

Via sumo el ok poentoj:

### Respondoj:

1. Bananoj kaj ananasoj estas fruktoj, **kiuj** estas tropikaj. 2. Bovino estas besto, **kiu** donas al ni lakton. 3. Venenaj serpentoj kaj krokodiloj estas bestoj, **kiujn** ni ege timas. 4. Bovinoj kaj ŝafoj estas farmbestoj, **kiuj** utilas al ni. Bestoj, **kiujn** ni amas. 5. Ŝafo estas besto, de **kiu** ni tondas la lanon. 6. Vesperto estas mamulo, **kiu** kapablas flugi. 7. Suzana, **kiu** loĝas en farmbieno, diras: "Ŝafo estas besto, **kiun** mi ege amas". 8. Hurikanoj estas ŝtormoj, **kiuj** estas ege danĝeraj.

2. 1. Krokodilo. 2. Svingante. 3. Freneziĝinta. 4. Hurikano. 5. Kanguruo. 6. Vesperton. 7. Farmbesto. 8. Danĝeraj. 9. Klasĉambro. 10. Venena. 11. Kolibro. 12. Mamulo.

3. La respondoj varias, depende de via loĝlando.

4. 1. Piloto laboras en vapora lokomotivo. **Malvera**. 2. Suzana svingis la manon kiel palmarbo en hurikano. **Vera**. 3. Steĉjo diras, ke vesperto estas mamulo. **Vera**. 4. Daĉjo nomis du danĝerajn reptiliojn. **Vera**. 5. Joĉjo svingis la manon kiel ebria kanguruo. **Malvera**. 6. Piloto estas mamulo. **Vera** – ĉu vi flugus se via piloto estus venena serpento? 7. Banano estas mamulo. **Malvera**. 8. Ananaso estas tropika frukto. **Vera**. 9. La bovino donas lanon kaj la ŝafo donas lakton. **Malvera**. 10. Steĉjo svingis la manon kiel la piedfingroj de kolibro. **Malvera**.

5. 1. Serpento estas... reptilio. 2. Ananaso estas... tropika frukto. 3. Joĉjo svingis la manon ... kiel freneziĝinta ventmuelilo. 4. Daĉjo svingas la manon... kiel ebria kanguruo. 5. Kiu povas nomi ... tri mamulojn, kiuj povas flugi? 6. Ŝafo kaj bovino estas... farmbestoj. 7. Vesperto estas... mamulo, kiu kapablas flugi. 8. La instruistino starigas demandojn... al la klasanoj.

Via sumo el 50 poentoj!



## Landaj Reprezentantoj – Perantoj de *Juna Amiko*

**Aŭstralio:** Aŭstralia Esperanto-Asocio, G. P. O. Box 2122 Melbourne 3001; *info@esperanto.org.au*. **Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg; *aon.913548977@aon.at*. **Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekenstraat 169, BE-2000 Antwerpen; *financoj@fel.esperanto.be*. **Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Bl. P 36, Ed. Venâncio III, sala 303, BR 70393-902 Brasília-DF; *belabutiko@esperanto.org.br*. **Britio:** Esperanto Association of Britain, Esperanto House, Station Rd, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE; *eab@esperanto.org.uk*. **Bulgario:** Mariana P. Evlogieva, PK 973, BG-1000 Sofia; *mrvp@interpres.org*; *ilei@espereto.com*. **Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-290 01 Poděbrady III.; *polnickypavel@seznam.cz*; *cea.polnickyy@quick.cz*. **Ĉilio:** Héctor Campos Grez, Casilla 231 Curico; *strigo@esperanto.cl*. **Ĉinio:** Gong Xiaofeng, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, Nanchang, CN-330031; *arko.gong@qq.com*. **Danio:** Arne Casper, Bryggervangen 70 4 tv, DK-2100 København; *arnecasper@yahoo.com*. **Estonio:** Ahto Siimson, Russa tee 2, Liu, Audru vald, EE-88302 Pärnumaa; *ahto.siimson@esperanto.ee*. **Finnlando:** Paula Niinikorpi, Rusthollintie 6 as 10, FI-28430 Pori; *paula.niinikorpi@gmail.com*. **Francio:** Saïd Balouchi, *said.balouchi@esperanto-france.org*. **Germanio:** Esperanto-Buchversand, Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, DE-55129 Mainz; *wolfgang.schwanzer@esperanto.de*. **Germanio:** Zsófia Kóródy, Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz; *zsofia.korody@esperanto.de*. **Hispanio:** Pedro Garrote, Apartado 119 Esperanto, ES-47080 Valladolid; Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell, *sandra@esperanto.cat*. **Hungario:** József Németh, Fo u. 41/5, HU-8531 Ihász; *jozefo.nemeth@gmail.com* (por superaj membroj de ILEI); Stefan MacGill; *stefan.macgill@gmail.com* (por simplaj abonoj). **Islando:** Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, Skolavorðustigur 6B, IS-101 Reykjavík; *esperanto@isl.is*. **Israelo:** Gian Piero Savio, Rehov Menora 13/4, IL-5349007 Givatajim; *saviogp@netvision.net.il*; *esperantisto@live.com*. **Italio:** Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43122 Parma; *esperoenparmo2020@yahoo.com*. **Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Japana filio de ILE, JP-162-0042 Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3; *esperanto@jei.or.jp*. **Koreio:** 464 Ho, Toegye-ro 217, Jung-gu Seoul, KR-04558, Republic of Korea, Korea Esperanto-Asocio, K-filio de ILEI, *www.esperanto.or.kr*, *kea@saluton.net*. **Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb; *marija@hes-keu.hr*. **Kubo:** Kuba Esperanto-Asocio, Apartado Postal 5120, CU-10500 La Habana 2. **Litovio:** Litovia Esperanto-Asocio, ab/k 167, LT-3000 Kaunas; *irenaa@takas.lt*. **Nov-Zelando:** David Ryan, PO Box 3867, Wellington 6140, *ryangomez@extra.co.nz*. **Pakistano:** Jawaid Eahsan, P.O. Box 26, PK-60000 Multan. **Pollando:** Magdalena Tatara, Grzegorzeczka 74/4, PL-31-559 Kraków; *mtatara@gmail.com*. **Portugalio:** Portugala Esperanto-Asocio, Rua Dr. Joao Couto 6, R/C A, PT-1500 Lisboa; *asocio@esperanto.pt*. **Rumanio:** Ioan Crâncău, B-dul București 5/53, RO-430281 Baia Mare. **Rusio:** Halina Gorecka, ab. ja. 1205, RU-236039 Kaliningrad; *sezonoj@mail.ru*. **Slovakio:** Peter Baláž, Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske; *petro@ikso.net*. **Slovenio:** Višnja Branković, Via Parini 5 IT-34 129 Trieste. **Sud-Afriko:** Colin Beckford, C2 Plaza Hill 3, Bower Road, ZA-7800 Wynberg. **Svedio:** Sten Svenonius, *fidinda@outlook.com*. **Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedom 6, CH-4224 Nenzlingen; *ch\_scheidegger@bluwin.ch*. **Tajvano:** Reza Kheirkhah, No. 105, Chung Ching Road, Pingtung, 900-73; *rezamenhof@yahoo.com*. **Togo:** Koffi Gbeglo, B. P. 13169, Lome; *esp.togo@cafe.tg*. **Usono:** Esperanto-USA, 2014 Capitol Ave #100, Sacramento CA 95811; *eusa@esperanto-usa.org*. **Por vidhandikapuloj:** Vjačeslav Suslov; *gloro59@yandex.ru*. **Mendojn eblas sendi ankaŭ al** *ilei.abonoj@gmail.com*.



La 3-a Komuna Kongreso de Japanio kaj Koreio (p. 36).



En la vendejo de Lee Mikyeong.